

LEGU NIAJN BELETRAĴOJN!



NOVA ŜEKSPIRAĴO EN ESPERANTO!

LA VIVO DE HENRIKO KVINA

kvinakta dramo pri la vivo de Henriko Kvina
post lia kronado kaj lia strebo al la franca krono

William Shakespeare (1564-1616).
Tradukis Humphrey Tonkin.
Rotterdam: UEA, 2003. 158p. 21cm.
ISBN 92 9017 083 2. Prezo: €12,00.
Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

LEGOLIBRO EL KANADO

LITO APUD LA FENESTRO.
Betty Salt (1907-1994).
Rotterdam: UEA, 1999. 111p.
€4,80. Triona rabato ekde 3 ekz.

Simplaj rakontoj, teatraĵetoj kaj
poemoj, kun kelkaj tradukoj el la
kanada literaturo. Stile belaj, ili
facile kaptas ankaŭ la malpli spertan
leganton, dank' al relative facila
lingvaĵo. Ankaŭ pro la mallongeco
de la plej multaj tekstoj la libro
bone taŭgas kiel progresiga legaĵo.



WINNIE-LA-PU

...en Esperanto!



Traduko de Ivy Kellerman
Reed kaj Ralph A. Lewin kun
enkonduko kaj vortolisto por
anglalingvanoj. Ilustraĵoj de
Ernest H. Shepard.

Eldonis UEA, 1992. Tole bindita
kun kromkovrilo. Prezo: €12,30.
Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

ESPERANTA ANTOLOGIO

POEMOJ
1887-1981

La dua, reviziita kaj
kompletigita eldono de
Esperanta antologio spanas
preskaŭ cent jarojn (1887-
1981) da originala poezio
en Esperanto. Nemalhavebla
pruvo pri la poeziaj kapabloj de
Esperanto. Redaktis William Auld.
Rotterdam: UEA, 1984. 887p.
Bind. Kun kromkovrilo. €23,30.
Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Fabeloj, mirindaĵoj kaj internaciaj rakontoj sur pli ol 400 paĝoj. . .

"Unika legolibro,
plej bonveniginda
kaj rekomendinda
al ĉiuj studentoj
de la Internacia
Lingvo."

Baldur Ragnarsson

Rotterdam: UEA, 1993 (dua korektita eld.). 431p. 21cm.
Prezo: €13,80. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



ISSN 0014-0635

Esperanto

revuo



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
96-a jaro • n-ro 1160 (6) • Junio 2003

Estrara raporto: UEA en 2002



La asociaj
kapitalo kaj
evoluigo

Biblioteko
Hector
Hodler

Ĉu fina
venko en
Bruselo?

La aprila
Estrara
kunsido

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establa kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎, ✉ +421 43 4222 788
✉ revuo@uea.org

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR
32); informiĝu ĉe via landa asocio
aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero
kostas EUR 3,00.

Anoncarifto (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p.
550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p.
90. Movada rabato 50%. Anoncoj
sur ekstera kovrilo kostas duoble.
Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964
SWIFT: PSTB NL21)

42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

☎ +31-10-436-1044, ✉ +31-10-436-
1751, ✉ uea@inter.nl.net

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Trevor Steele.

Vi trovos...



en tiu ĉi numero la promesitan enketilon, kiu helpas al la
redaktoro ekscii, kion vi, kara leganto, opinias pri la revuo:
kio en ĝi plaĉas kaj ne plaĉas, kion vi preferas kaj malpreferas. Mi petas vin, ne
subtaknu la gravecon de tiu ĉi iniciato: ja ankaŭ vi povas influi la enhavon kaj
aspekton de la estontaj numeroj. Bonvolu do se eble tuj plenskribi ĝin ("laŭte
kaj kuraĝe!"), faldi, alglui la poŝtmarkon kaj – forsendi... La Estrara raporto estas
ĉi-foje iom pli ampleksa ol kutime, kio ŝovis plurajn bonegajn artikolojn (ekz. la
promesitan daŭrigon de *La lingva interplekto eŭropa* kaj plurajn kutimajn
rubrikojn) al la julia numero. Bonvolu ne koleri pro tio je via redaktoro...

Enhavo

- 123 Malferme: Pri kapitalo kaj evoluigo (Humphrey Tonkin).
124 Verda literaturo el Svedio (Sten Johansson).
125 Nekutima sperto (Nadine Rivière).
126 Ĉu fina venko en Bruselo? (Brusela Komunikadcentro).
127 Pli kaj pli da oazoj en la dezerto (Philippe Chavignon).
128 Aktuala leksikono pri Biblioteko Hector Hodler (Ziko Marcus Sikosek).
129 Novstila kongresa dimanĉo (Humphrey Tonkin).
130 Ĉu resti aŭ ne resti: tiel staras nun la demando (Humphrey Tonkin).
UEA-membraro fine de 2002.
131 Estrara raporto 2002: UEA en 2002 (redaktis Humphrey Tonkin).
132 1. La Laboro. 1.1 Informado (Andrej Grigorjevskij). 1.2 Instruado (Gbeglo Koffi).
133 1.3 Utiligado: Faka Agado (Ivo Osibov). 1.4 Kulturo (Gbeglo Koffi).
134 1.5 Informado kaj utiligado: Kongresoj (Ivo Osibov). 1.6 Eksteraj rilatoj (Lee
Chong-Yeong).
135 1.7 Landa kaj Regiona Agado (Michela Lipari).
137 1.8 Esploro kaj Dokumentado (Humphrey Tonkin).
138 La organiza bazo: 2.1 La Decida Organo; La Komitato. Spezokonto. Bilanco.
139 2.2 La Estonteco: Rilatoj kun TEJO. Rimedoj. Pasivoj.
140 2.3 La Bazo kaj la Gvidado: Administrado.
141 Laste aperis.
142 2.4 Kiel funkcias UEA? La Estraro. Kion alportis la aprila estrarkunsido?
(Andrej Grigorjevskij).

FRONTPAĜE: Dum la aprila Estrara kunsido (legu pli sur la p. 142) okazis renkontiĝo de
la ofistoj kaj la estraranoj de UEA, kiu klarigis plurajn miskomprenojn. Sur la foto de
Ziko Marcus Sikosek la estraranoj kaj la ofistoj antaŭ la Centra Oficejo en Roterdamo.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

**Prezidanto (strategia forumo, strategio kaj
planado, Unesko):** d-ro Renato Corsetti, Via del
Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎+39-06-957-
57-13; ✉+39-06-957-66-33; ✉renato@esperanto.
org.

**Vicprezidanto (esploro kaj dokumentado,
kulturo):** prof. Humphrey Tonkin, 279 Ridgewood
Road, West Hartford, CT 06107 Usono; ☎+1-860-
561-26-69 [h]; ✉+1-860-561-52-19 [h]; ☎+1-860-
768-44-48 [of]; ✉+1-860-768-44-11 [of]; ✉tonkin@
mail.hartford.edu.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-
Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong,
Taegu 706-031, Korea Resp.; ☎+82-53-765-0880
[h]; ✉+82-53-652-4488 [of]; ✉+82-53-652-8141 [of];
✉+82-53-765-0881 [h]; ✉lee@esperanto.net.

**Ĝenerala sekretario (faka agado, rilatoj kun
la Komitato, kongresoj, Nobel-kampanjo):**
s-ro Ivo Osibov, Vinkovačka 25, HR-21000 Split,

Kroatio; ☎+385-(0)21-535-650 [h]; +385-(0)21-355-
550 [of]; ✉+385-(0)21-393-597 [of]; ✉osibov@
pravst.hr.

Financo, administrado: s-ino Ans Bakker-ten Hagen,
Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlan-
do; ☎/✉+31-(0)20-642-18-53; ✉ans.bakker@
esperanto.org.

Eduko, ILEI-rilatoj, sporto, afrika agado: s-ro
Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé,
Togolando; ☎+228-227-21-17; ✉esp.togo@cafe.tg.
Informado, rilatoj kun TEJO: s-ro Andrej
Grigorjevskij, ul. Lenina 40-14, RU-429120 Ŝumerlja,
Ĉuvaŝa Respubliko, Rusio; ☎+7/83536/59856; ✉
volg@uea.org.

Landa agado: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare
223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-06-39-72-61-98;
✉+39-06-39-72-61-69; ✉michela.lipari@esperanto.org.
Observanto de TEJO: s-ro Holger Boos.
Observanto de ILEI: s-ro Mauro la Torre.

Malferme

Pri kapitalo kaj evoluigo

Humphrey Tonkin

En sia aprila kunsido la Estraro de UEA, post longa
debato, decidis ne meti en sian financon planon por
2004 proponon pri dungo de plentempa ofisto, kiu
laboru en la Centra Oficejo nome de TEJO, la junulara sekcio
de UEA, kaj sub ĝia gvido. La propono antaŭvidis utiligon de
parto de la kapitalo de la Asocio por tiu celo, do ekster la
regula buĝeto. Kvankam en si mem la propono ŝajnis al la
estraranoj nerealegebla en sia nuna formo, ĝi konsistigis parton
de ege interesa analizo de la situacio de la Asocio, en kiu oni
argumentis, ke la Centra Oficejo urĝe bezonas modernigon,
ne nur fizike sed ankaŭ laŭ siaj laborprincipoj. Tiun modernigon
akompanu ankaŭ nova aliro al mastrumado de la asocia
kapitalo, kiun oni "investu" en la laboron de la Asocio.

La propono, kiun prezentis en Roterdamo tri estraranoj de
TEJO (Ilja De Coster, Marko Lins, Federico Breda) antaŭvidis
dungan de persono, inter kies ĉefaj taskoj estus serĉado de
novaj fontoj de rimedoj, ekzemple pere de subvencioj de la
Eŭropa Unio. Tio ne nur stimulus la agadon, sed ankaŭ la
enspezoŭfluo de la Asocio. Tiu persono ankaŭ prizorgus la
administradon de TEJO.

Normale, oni konsideras la kapitalon de asocio tia, kia estas
la nia, netuŝebla: tio igis la Estraron taŭge hezitema. Eĉ se tia
kapitalo ne estas destinita por iu specifa celo, oni kutime
investas ĝin en akciojn aŭ aliajn valorpapirojn, kiuj produktas
enspezojn. Tiuj enspezoj aŭ ree investiĝas aŭ estas uzataj por
la normalaj elspezoj de la asocio.

La Estraro tamen decidis pludoni la proponon al la Komitato
de UEA, por almenaŭ stimuli debaton pri la estonta financado
de UEA. Kiel montris nia iama prezidanto Grégoire
Maertens en lastatempa analizo, en lastaj jaroj la
kapitalo de la Asocio multe kreskis, interalie pro
testamentaĵoj de mortintaj membroj. Tiu rapida
kresko igis plurajn voĉojn en nia rondo levigi per
aserti, ke la aliro de UEA al tiu fonto de rimedoj estas
tro konservativa. Laŭ ili, oni devus ne nur elspezi la
renton, sed ankaŭ uzi parton de la kapitalo mem
por financi agadon de la Asocio, alikaze nefinancelan,
kiu kreas pli firman bazon por nia agado. En la Estraro
kaj Komitato de UEA ekzistas divido de opinio inter
tiuj, kiuj insiste emfazas, ke la Asocio ne elspezu
en difinita jaro pli ol ĝi regule enspezas (ĉar fari
tion estus iasence perfidi la intencojn de la
donacintoj de la kapitalo), kaj tiuj, kiuj egale
insiste emfazas, ke asocio, kiu ne progresas
adekvate, mise agas antaŭ siaj apogantoj se ĝi
ne plene uzas la rimedojn je sia dispono.

Persono, mi pli inklinas al la dua vojo ol al
la unua. Kun kelkaj esceptoj (notinde la
financado de la pligrandigo de la CO en la
1970-aj jaroj), nia aliro al la uzo de la kapitalo
de la Asocio estas konservativa. Tio decas al
bonfara asocio, kies membroj pene kaj tra multaj jaroj

akumulis tiujn rimedojn. Se temus pri profitcela entrepreno,
pli agresa politiko eventuale taŭgus.

Laŭ mia opinio la situacio de nia Asocio en la nuna tempo
favoras, tamen, pli decidan vojon. Dum jaroj ni faras nian
laboron esence pere de la kotizoj, kiujn ni ricevas de niaj
membroj, kaj la kongresoj, kiujn ni organizas por ili. Sed en la
erao de interreto, kiam tradiciaj sistemoj de organizado ne
plu funkcias kaj novaj aperas, la membronombro, kaj sekve la
kotiza bazo, falas. Necesas drasta reorganizo de la Asocio por
igi ĝin pli responde al la hodiaŭaj bezonoj, pli malferma al
novaj metodoj, kaj pli fleksebla kaj kapabla kapti bonajn
okazojn, kiam ili prezentiĝas. La proporcio inter la rutinaj
laboroj de la Asocio kaj la informa kaj eduka flankoj de nia
agado devas ŝanĝiĝi: ni devas fariĝi pli dependaj je volontulaj
fortoj (kontraste al profesiaj), pli pretaj vendi niajn varojn kaj
pli emaj prezenti niajn servojn al publikoj ekster nia regula
membraro.

Sed kiel atingi tiun rezulton? La ŝrumpantaj enspezoj ne
sufiĉas por produkti la kapitalajn kaj agadajn investojn
necesajn por realigi tiun ŝanĝon de direkto sen malmundo de
tio, kion ni jam havas. Tion klare komprenis la gvidantoj de
TEJO, kiuj prezentis sian proponon.


Antaŭ unu jaro, UEA kaj la landoj de la Eŭropa Esperanto-
Unio kombinis siajn fortajn por lanĉi la Bruselan Komunikadan
Centron, por disvastigi informojn pri Esperanto. Malgraŭ la
imponaj sukcesoj de la Centro (sub gvido de profesia ĵurnalisto
Dafydd ap Fergus) dokumentitaj en pluraj artikoloj en nia revuo,
la landaj asocioj ne sukcesis trovi la monon por kovri sian
parton de tiu kosto – kaj rezulte UEA devis utiligi pli da mono
ol ĝi komence pretis investi, kio nur kontribuis al ĝiaj
buĝetaj problemoj. Por la jaro 2004 tiu ĉi ero mankas en
la buĝeto, kiun la Asocio prezentos al la Komitato en
Gotenburgo, kaj sekve oni riskas perdi ne nur la
proponon de TEJO sed ankaŭ la bruselan iniciaton.

La Komitato en Gotenburgo devus insisti pri drastaj
reformoj en la plenumado de la rutina laboro de la Asocio,
sed doni al la Estraro sufiĉan spirospacon por
plani kaj realigi tiujn reformojn. Oni tre
zorge kaj elekteme utiligu la kapitalon
por atingi difinitajn rezultojn:
konantoj de nia historio scias,
ke jam en la 1920-aj jaroj
UEA lernis kiel fordiboĉi
siajn kapitalajn rimedojn
casante kimerojn, kaj
pro tio preskaŭ detruis
sin. Tio ne ripetigu nun
– sed ankaŭ ne okazu la
malo, nome ke UEA mortu
riĉa sed senkuraĝa. Ni esploru
manierojn pli decide laborigi nian
kapitalon por la bono de la Asocio.



Verda literaturo el Svedio

La "diligenta kolegaro" en Svedio ne amase kontribuis al la originala literaturo Esperanta. Troviĝas esceptoj, sed por trovi la du plej gravajn, necesas retro-salti tra la tempo duonan jarcenton. En la jaroj 30-aj ĝis 50-aj Stellan Engholm (1899-1960) kaj Ferenc Szilágyi (1895-1967) apartenis al la pintoj de Esperanta prozo.



Sten Johansson



La verkoj de Engholm estas esence ideaj, tamen lokitaj en popolan medion. Grava verko estas la romano *Homoj sur la tero*, per kiu li gajnis roman-konkurson de *Literatura Mondo* en 1931. Ĝi prezentas la vivon de tri generacioj da terkultivistoj, kaj ĉefrolas en ĝi la tero kaj ties signifo por la homa spirito. Konata estas ankaŭ lia trilogio pri *Toronto* el 1934-1946, kie rolas kelkaj infanoj kaj junuloj en sveda feruzina urbeto dum la jaroj tridekaj. Al hodiaŭa leganto mi tamen unuavice rekomendus liajn novelojn, kolektitajn en *La lupo sur Kapitolo* (1997). En ĉiuj liaj verkoj oni ĝuas simplan, konkretan stilon.



Szilágyi estis centreŭropa intelektulo el Budapeŝto, hazarde replantita en nordan humon. Li estas unu el la ĉefaj stilistoj de la Esperanta prozo el ĉiuj epokoj. Ankaŭ la humanismaj kaj toleremaj ideoj de liaj verkoj tre gravas. Elstaras la novelo *Koko krias jam!* (1955) kaj la romano *Mistero minora* (1958), sed ankaŭ liaj pli fruaj novelaroj imponas. Ial Szilágyi ne estas laŭmerite konata, eble pro la ekzila vivo en Svedio, kiu tamen inspiris al li temojn de pluraj trafegaj noveletoj pri kulturaj diferencoj. El la poezia kampo menciindas la poemoj de *Magda Carlsson* (1896-1971), kiu tamen pli multe tradukis ol verkis. Ankaŭ Engholm kaj Szilágyi bonege tradukis prozon kaj poezion.

Hodiaŭ eble plej famas poetoj: la konkretisto **Jarlo Martelmonto** (Jarl Hammarberg), konata poeto ankaŭ svedlingve, kaj la lirikisto **Aira Kankkunen**. De Martelmonto aperis tri originalaj poemaroj Esperantaj: *Ajn* (1983), *Ike ize ive* (1991) kaj *Cetercetera* (2002). En lia poezio ne estas frazoj, nur vortoj, kiuj kreas kvazaŭ vortpentraĵojn. De Kankkunen aperis du poemaroj kaj unu novelaro. Plej konata estas eble ŝia poemaro *Neniu povas ŝangi hieraŭon* (1996).



Jen kaj jen videblas en la Esperanta gazetaro poemoj ankaŭ de aliuloj, ekz. **Franko Luin**, **Leif Nordenstorm**, **Malte Markheden**. De **Gunnar Gällmo** kaj **Harold Brown** aperis interalie dramoj, de **Stig Jacobson** noveloj. Kaj ankaŭ la verkinto de ĉi artikolo ŝutis aron da libretoj sur la verdajn libretojn, inter kiuj troviĝas du novelaroj, tri facillegaj rakontoj kaj kvar krimromanetoj. Informoj pri Esperantaj aŭtoroj kaj originalaj verkoj legeblas Interrete ĉe <http://dreamwater.net/esperanto/> aŭ <http://www.geocities.com/origlit/>.

Traktante la Esperanto-verkadon en Svedio, ni ne forgesu la muzikistojn. Unue la tekstoj de la Stokholma rok-grupo **Persone** atingis amason da ge- kaj eksjunuloj. Plue la disfalo de Sovetunio jetis sur la Baltmaran bordon de Svedio aron da muziktalentuloj. Jam ĉie oni konas la tenerajn kantotekstojn de **Jomart Amzeev** kaj aliaj. Jen literaturo kiu penetras ne nur tra la oreloj, sed eĉ en la korojn!

Sten Johansson

Nekutima sperto

Dum la someraj ferioj, nia familio vojaĝis kvinope al Benino, malgranda lando okcidente en Afriko. Dank' al Gaston Houssou kiu akceptis nin en la lokalo de la Esperanto-asocio de Lokossa, ni vivis dum du semajnoj laŭ la afrika maniero.



La orfa lernejo esperantista

Ni tiel mem konstatis kiom bonŝancaj ni estas: premu la ŝaltilon, tuj aperos lumo; turnu la kranon, kaj alvenos trinkebla akvo, eĉ varma aŭ malvarma, laŭ via deziro! En Benino, multaj homoj ne havas elektron kaj devas paŝi tre longe por atingi la puton kie ili povos elcerpi sitelon da netrinkebla akvo. En la vilaĝoj, la loĝejoj ankoraŭ estas faritaj el pajlargila mortero, la homoj dormas surgrunde kaj la infanoj estas preskaŭ ĉiam senvestaj.

Unu el la celoj de nia vojaĝo estis vizito de la orfa lernejo esperantista, kies direktoro estas Gaston Houssou mem. En Benino, la publikaj lernejoj ne estas senpagaj kaj, kvankam la prezo ne estas alta, multaj infanoj ne povas iri al tiuj lernejoj. La lernejo de S-ro Houssou akceptas la infanojn de tiuj kiuj ne povas pagi la publikan lernejon. Ĝi akceptas ankaŭ georfojn. Tial ĝi daŭre bezonas monhelpon.

Do, ni loĝis en Lokossa kaj dum dek tagoj ni veturis ĉiumatene je dudek-kilometra distanco, laŭ vojoj tra la savano ĝis la vilaĝo Tozounmé.

La unuan tagon la infanoj (inter 4- kaj 13-jaraĝaj) akceptis nin per kantoj en la lingvoj fon, Esperanto kaj la franca, kaj per afrikaj dancoj. La programo estis tre simpla: matene, ni okupiĝis pri la infanoj; ni tagmanĝis en la orfejo, kaj

poste piediris tra la vilaĝo por saluti iliajn familiojn. Posttagmeze ni denove estis kun la infanoj.

La lernejo akceptas pli ol cent infanojn disigitajn laŭ tri klasoj. Mia patro Christian Riviére okupiĝis pri la plej grandaj kaj instruis al ili la bazojn de Esperanto; mia patrino Martine kaj la fratino Solange vartis la plej junajn (kantetoj, ludoj ...), kaj mi mem prizorgis la grupon de la mezaĝaj infanoj.

Ni rapide konstatis ke ni ĉiuj havas la saman problemon: kiel komuniki kun tiuj infanoj? Efektive, kvankam la franca lingvo oficiale estas la "lingvo de la lando", ni ekkomprenis ke ili tute ne regas ĝin. Konsekvence, ilia unua tasko, kiam ili eniras lernejon, estas eklerni fremdan lingvon kaj uzi ĝin dum ĉiuj kursoj (literaturo, matematiko, historio ...). Kaj eĉ la instruistoj kiuj supozeble devus paroli la francan por ĝin instrui, ofte nin ne komprenis (kaj inverse)!

Ni ĉiam estis reĝe akceptataj; ĉiam ni vidis ridetojn sur la vizaĝoj, eĉ se la vivkondiĉoj plej ofte estas minimumaj.

Krome ni estis komisiitaj transdoni, je la nomo de "Centre Culturel Nantes Espéranto" kaj "Espéranto 44" (du asocioj de suda Bretonio), sumojn kiuj ebligis restarigadon de klasĉambro kaj konstruadon de alia. Komence de la lerno, uzeblis entute kvar klasĉambroj.

Sed tia ago estas nur guto en oceano de bezono. Mankas ĉefe la lerniloj, libroj, papero, kajeroj, kreto, pli modernaj tabuloj ...


Ni varme gratulas la tutan sindediĉan skipon de la lernejo kaj orfejo, interalie G. Houssou, kiun ni plian fojon dankegas pro ĉio. Bela pruvo ke Esperanto estas kaj efika rimedo por helpi, kaj tutkontinenta celo por malaperigi lingvajn barilojn.

Nadine Riviére



La infana orfejo en Tozounmé

fotoj: la aŭtorino



Ĉu fina venko en Bruselo?

Kiom longe ekzistas diskriminacio en la interna komunikado de la institucio de la Unio, la kompetentaj organoj entreprenu esploradon en la kampo de ne-diskriminacia sistemo kiel universala lingvomodelo planlingva, diras la findeklaro de simpozio organizita de la esperantisto Michael Cwik, porparolanto de la organizanta 'Forumo por lingvaj rajtoj kaj kultura diverseco'.

La simpozio, okazinta la 6-an de majo en la Eŭropa Parlamento en Bruselo pri la temo *Kiun lingvopolitikon por plurlingva Eŭropa Unio?*, allogis centon da politikistoj kaj interesitoj. Ĝi estis organizita de diversaj eŭropaj kaj lingvoasociaj organizaĵoj. Malgraŭ kontraŭaj klopodoj, la ĉeforganizanto Michael Cwik sukcesis teni mension pri Esperanto en la fina deklaro. La grava simpozio alvokas la Eŭropan Union subteni studojn pri realigadoebleco kaj faciligi lingvoeksperimentojn rigarde al finfina solvo de restanta diskriminacio en interna kaj interetna komunikado.

Ĉu la simpozio estas antaŭsigno de la fina venko en Eŭropo? Entute ĝi estas utila afero, ĉar ĝi helpas pliatentigi pri la dimensioj de la eŭropa lingvo-problemo, diras Detlev Blanke, direktoro de la Societo por Interlingvistiko kaj docento ĉe la Humboldt-Universitato en Berlino. *Oni ŝajne pli ol antaŭe jam iel akceptas, ke ankaŭ tia alternativo almenaŭ estas diskutebla. Tamen nemulte da homoj – jam pro politikaj kaŭzoj – donas ŝancon al la proponita planlingva modelo. Se oni atingus, ke iam oni almenaŭ verkos oficialan ekspertizon pri la 'nuna stato de la aplikado de planlingvoj' kaj eventuala perspektivo, tio jam estus granda sukceso. Tia oficiala ekspertizo devus okazi antaŭ la proponoj pri eksperimentoj.*

Blanke prelegis pri "Ŝancoj kaj limoj de planlingvoj". La planlingva problemoj estis lerte enkadrigitaj en la tuton, do ne altrude. Tamen, dufoje 15 minutoj kompare al la aliaj programoj, kaj foje senfinaj detaldiskutoj, estis iom maltra. Cwik gratulinde preparis, laboris, diskutigis, gvidis. Tiaj simpozioj valoras, se oni ne havas tro da nerealaĵoj, opinias Blanke.

La simpozianoj havis okazon aŭskulti Esperantan prelegon de Věra Barandovská pri Planlingvo kiel ilo por lingvolernado. Altnivelan interpretadon el Esperanto francan garantiis Angelos Tsirimokos, profesia tradukisto ĉe la Konsilio de la Eŭropa Unio. El lia franca la interpretĉeloj relakse interpretis al la aliaj oficialaj lingvoj de la simpozio: la angla kaj la



Prelegas parlamentanino Astrid Thors. Dekstre Detlev Blanke. Foto: Michael Cwik

germana. La interpretado al nur tri lingvoj fakte estis unu el la raraj kritikindaĵoj. *Kial mi devas pagi dek eŭrojn por interpretado inter kaj el la grandaj lingvoj, nome la franca, germana kaj angla? plendis nederlandlingva partoprenanto. La interpreta servo de la Eŭropa Komisiono ne pretis finance subteni interpretadon. La organizantoj devis en la lasta momento dungi privatajn interpretistojn por garantii bazan interpretadon en tri lingvoj. Tiuj tri estis relative egalkvante parolitaj. Estis tamen nur germanoj, kiuj pretis rezigni paroli en sia gepatra lingvo kaj ofte ŝanĝis al la angla. Germana parlamentano eĉ pretus limigi la uzadon nur al la angla, observis Marko Naoki Lins, projektmanagero de la Brusela Komunikadcentro.*

La simpozio ne estas antaŭsigno de la fina venko. Tamen homoj serioze konsideras Esperanton kiel alternativon. Tiel resumis Dafydd ap Fergus, ĝenerala sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio, sian impreson pri la simpozio. Oni ankaŭ alimaniere kaj pli klare parolas pri la lingva malegaleco. Tio estas komenco kaj kelkaj neesperantistaj partoprenantoj laŭdis la agemon de esperantistoj en la defendado de la principo de la lingva egaleco, ĝojas Dafydd ap Fergus, kiu koncize prelegis pri kazoj de lingva diskriminacio en dunganoncoj. Post la simpozio parlamentano petis de mi pli da informoj pri la lingvaj problemoj.

Postagmeze la simpozio koncentriĝis al praktikaj paŝoj por la estonto. La parlamentanoj Jean-Maurice Dehousse el Belgio kaj Astrid Thors el Finnlando konfesis ke la konkretaj rezultoj de la Eŭropa jaro de Lingvoj en 2001 estis magraj. Konkreta ideo por longdaŭre efika aliro povus esti establo de eŭropa oficejo por plurlingvismo. Mi ŝatas tiun ideon, opinias Seán Ó Riain, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, ni bezonas eŭropan programon por lingvolernado kaj plurlingvismo, kiu kreas emon kaj instigon al fremdlingva lernado. Mi estas kontraŭ iu ne-intervena principo, ĉar mi ne kredas ke la merkato solvas ĉion. Kulturo kaj da lingvo sekvas la ekonomion. La merkato jam forte tendencas al 'solvo', kiu reprezentas nur la anglan. Sed se ni devas protekti lingvojn, necesas politike kaj individue kontraŭi.

Dum la simpozio esperantistoj vigle atentigas pri konkretaj lingvaj problemoj en la eŭropaj instancoj. Lins ĝeniĝas por decido ke la surbendigoj de la eŭrop-parlamentaj sesioj estu tradukitaj unue nur en la anglan. Tiu angla versio servu poste kiel fonto por la tradukoj en la aliajn lingvojn. La sekvo estas sufiĉe klara:



Aŭskultantoj dum la simpozio. Foto: Michael Cwik

Pli kaj pli da oazoj en la dezerto

Trian sinsekvajn jaron mi trairis Centran Amerikon en decembro kaj januaro. Elirante el Usono mi kunportis skatolon da libroj donacitaj de ELNA kaj sufiĉe grandan stokon da vestaĵoj, donacotajn survoje.

En Meksiko, kiun mi fulmrapide traveturis, mi gustatempe atingis Oaxaca por partopreni Zamenhoftagon organizitan de la loka klubo, gvidata de Aurora kaj Leandro García, en belega muzeo. Notindas ke okazis diservo fare de la pastro Claramunt akompanata de infana ĥoro, ĉio Esperante. En San Cristobal de las Casas, mi ĝoje renkontis junan freŝbakitan esperantistino Marcela, kun kiu mi jam korespondis rete. Eble dank' al ŝi la ĝisnunaj kontaktoj kun la tieaj indiĝenaj organizitoj kondukos al konkretaj paŝoj.

En Gvatemalo, post duhora veturado mi sukcesis retrovi indiĝeninojn de longe izolitan kaj, malgraŭ la ĵarfinaj festoj, kiuj malfaciligas kunveniĝi lernemulojn, starigis kurseton en nova komunumo. Krome la kontaktoj inter la ĉefurbaj esperantistoj kaj la indiĝenoj revigligis. Vizito al iama lernantino de Tibor Sekelj estis emociplena kiam ŝi eliris el sia fotokoleto nebulan bildon kie eblis rekonii ŝin kaj Tibor ĉe la pinto de kostarika vulkano.

En Honduro la movado daŭre staras sur du pilieroj: talentaj retlernintoj Reynaldo Noll kaj Elmer Escoto, sed la plukonstruado prokrastiĝas. Tamen mi havis interesan kontakton kun deputito kies patro estis esperantisto. Li jam parolis pri nia movado al kolegoj.

Ĉi-jare Nikaragvo surprizis min. Skeptike mi haltis en Estelí, kie iam estis E-grupeto. Per nur duhora halto, mi retrovis la

restantajn interesitojn kaj provis reentuziasmi ĝin. En Managvo akompanata de la ĉiam fidela Eddy Sylva, mi vizitis la vickonsulon de Brazilo, kiu pretas instrui Esperanton, kaj s-ron Cuadra Ortegarey, eksmembro de la Supera Kortego, kiu montris inklino reaktivigi kaj informis nin pri sia kolego ĵuĝisto, kiu interesiĝas pri Esperanto. Aliaj spuroj de malnovaj nikaragvaj esperantistoj aperis antaŭ nelonge en la reto. Do mia lakona komento pasintjara en Nikaragvo la *situacio stagnas* ne plu aktualas.

En Kostariko mi instruis kelkajn tagojn en indiĝena komunumo, ĉar mi volis dediĉi pli da tempo al Panamo, kiu daŭre rezistas Esperantan invadon!

Malgraŭ anticipa preparo per retkontaktoj kun Roberto Pérez kaj Alejandro Carrasquilla, kiam alproksimiĝis la alvendo, ne eblis organizi



Cseh-kurso por indiĝenoj en Parramos – Gvatemalo. Maldekstre staras la aŭtoro Philippe Chavignon.



Zamenhof-tago en Oaxaca-Meksiko

kurson kiel ni esperis. Tamen la vizito, post preskaŭ 15 000-kilometra veturado ne estis vana. Post partopreno en radioelsendo, dank' al Roberto, ni prelegis antaŭ grupo de **Mensa*, kaj tuj antaŭ mia foriro mi sukcesis interveni dum kelkaj minutoj okaze de la ferma ceremonio de la Nacia Kongreso de la Indiĝenaj Popoloj de Panamo. Notindas ke la panamaj indiĝenoj ĝuas la plej favoran statuson el tuta Centra Ameriko precipe pri teritoria aŭtonomeco kaj ke dum la kongreso kelkaj kacikoj bezonis interpretiston el etna lingvo al la hispana.

Konklude, la evoluo en Mezameriko daŭre estas favora dank' al la reto kaj al disvolvigo de la rilatoj inter la E-movado kaj indiĝenaj medioj. Tiucele nia kontribuo estas esperata por sukcesigi plurajn starigantajn ekoturismajn kaj ***nutroproduktajn* projektojn en Gvatemalo kaj Kostariko. Ĝi estus ankaŭ aprezata rilate defendon de la indiĝenaj rajtoj.

Philippe Chavignon
werpha.tao@wanadoo.fr

**Asocio por elstaraj menskapabluloj (Jarlibro p. 61). **Pri nutroproduktaj projektoj, eblas kontribui al Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ Malsato, kiu eldonas E-bultenon: <http://www.globidar.org>.*

ekzemple kontribuo de portugala deputito estos unue tradukata en la anglan kaj el ĝi en la hispanan. *Stultaĵo! Kial nur irlandaj kaj britaj civitanoj ricevu estonte profesiajn rekte tradukitajn dokumentojn kaj ĉiuj aliaj EU-civitanoj nur malplikvalitan, nerektan version? La Eŭropa Parlamento kaj ĝiaj politikistoj eĉ ne kapablas ordigi la lingvan demandon en sia propra domo, opinias Dafydd ap Fergus de Eŭropa Esperanto-Unio. Ne nur diskriminacia, sed ankaŭ praktike tute absurda estas tiu labormaniero, almenaŭ kiam temas pri lingvoj pli intime parencaj inter si ol al la angla, rimarkigas Tsirimokos. Jes, pragmatikan solvon, sed kial tiam tiom premi la anglan? Ofte ĝuste la angla havas malbonan koncepton por EU-diskutoj pri ekzemple legaro aŭ vino.*

Post la plendoj pri specifaj lingvaj problemoj, la germana parlamentano Michael Gahler promesis trakti la problemon. La administracio ofte faras tion, kion ĝi opinias taŭga. La Eŭropa Parlamento insistas pri la plurlingvismo, asertas Gahler. Alia parlamentano Dehousse iomete pesimistas: *Certe estas misproporcio inter la daŭra substreko de lingva*

diverseco kaj la realeco kun ĝia monolingvismo ĝi al la angla. Pluraj partoprenantoj proponis solvojn. Unu substrekis ke pragmatismo necesas same kiel pontolingvo, kiam EU havas 21 lingvojn – jam por subteni la tutan sistemon. Aliaj regus lingva anarkio. Alian ideon havas Yvo Peeters, flandra lingvarajta aktivisto: *Neniu parolu sian gepatran lingvon. Tio jam en la 70-aj jaroj estis propono de la dana registaro.*

La simpozio ne povis rezigni pri kelkaj kontraŭdiraj diskutaj temoj. Kelkaj tre emfazis la teknikan rolon de lingvo kiel komunikilo kaj vidis en la angla lingvo pragmatikan praktikan solvon kiel 'Esperanto de hodiaŭ'. Aliaj substrekis la neceson distingi ĉe lingvopolitiko inter interna kaj ekstera uzo. Nome, ke ene de la EU-instancoj oni certe devas trovi pragmatikajn solvojn, sed la civitano kaj la elektita deputito ĉiam povu paroli en sia gepatra lingvo.

Pliaj informoj pri la simpozio haveblas ĉe la simpozia retejo: <http://www.europe-citizen.net>, <http://www.lingvo.org/xx/3/285>

Brusela Komunikadcentro

Aktuala leksikono pri Biblioteko Hector Hodler

Ziko Marcus Sikosek

Kiam Hector Hodler mortis en marto 1920, la tuberkuloza 33-jarulo postlasis al Universala Esperanto-Asocio tri aferojn. La grandega kapitalo, kiu baziĝis sur la pentrista sukceso de la patro Ferdinand Hodler kaj kiu certigu la estontecon de la Asocio, estis foruzita ĉefe jam en la 20-aj kaj 30-aj jaroj.

La legantoj de la dua heredaĵo, nia revuo *Esperanto*, eble rememoras ke dum jaroj aperadis ĉi tie avertoj pri la malbonega stato de la tria, nome Biblioteko Hector Hodler (BHH). Tiu trezoro de la Esperantaj historio, literaturo kaj kulturo ĝenerale ricevis nur malmulton de la atento, kiun ĝi meritas. Estas malbonŝanco ke la plej multaj membroj loĝas tiom for de Roterdamo kaj eble eĉ ne konscias pri la teoria utiligebleco, aliflanke, mi aldonas cinike, povus eĉ boni se oni ne vidas la lokan kaoson.

Ekde februaro mi laboras ĉi tie, sed mia kontrakto kun UEA daŭras nur ses monatojn. Dum tiu ĉi tempo mia tasko estas verki raporton por *Esperantic Studies Foundation* kun rekomendoj por la estonteco de BHH kaj la Arkivo de UEA. Krome mi jam komencis kelkajn el la farindaj laboroj. Bibliotekisto, tiel oni kvazaŭoficiale nomas min, sed krom tio mi estas arkivisto, dokumentad-managĝero kaj fakte la "endoma historiisto", al kiu venas esplorantoj kun demandoj. Lastatempe pli kaj pli, cetero. Mi ŝate rememoras la grandan gojon de nia 82-jara gasto Georges Kersaudy, al kiu mi kopiis artikolon kun foto pri li, el 1954. Jen mi provas prezenti al vi tiun agadon per "leksikono", nekompeta kaj neperfekta, kiu baziĝas sur raporto verkita por la Estraro fine de marto 2003.

Arkivo: Dum la pasintaj jardekoj oni postlasis "hipotekojn" al la posteuloj, nome, oni foje simple metis neordigitan stokon da leteroj en grandan skatolon kaj ŝovis ĝin al iu angulo. Nun mi jam okupiĝis pri kelkaj el tiuj skatoloj kaj komencis selektadon kaj ordigadon. Tiel, malrapide, estigas vera, superrigardebla Arkivo de UEA. Tia superrigardo necesas por ekstarigi modernan ordon de arkivado, ĉu de la CO, ĉu de la aliaj asociataj organoj. Necesas ankaŭ intervjuoj kun oflistoj kaj aliaj aktivuloj, por lerni pri la bezonoj kaj nunaj kutimoj.

Domo: La esploroj, cerbumoj kaj diskutoj pri la domo de UEA ankoraŭ daŭras. Ĉu oni restos en Nieuwe Binnenweg, ĉu oni translokiĝos, ĉu oni anstataŭigos ĝin per pluraj oficejoj en diversaj lokoj? Estas malfacile proponi ion rilate al BHH kaj Arkivo de UEA, ne estante certa pri tio. Esperinde la nuna fazo de renovigo montriĝos fine ŝanco.



Ziko Marcus Sikosek

Eldonado: Estas iom frue grandskale cerbumi pri la grandaj ebloj de interesaj eldonaĵoj, al kiuj la biblioteko povos kontribui. Ni havas ekzemple la unuan Jarlibron de UEA, el 1908 – ĉu represo ne estus interesa legaĵo por multaj esperantistoj? Okazis jam pluraj skandaloj kaj diĝitigoj por eventuala publikigo.

Eliroj: En la domo, proksime aŭ malproksime de la biblioteko, troviĝas libroj kaj aliaj materialoj, kiuj ne estas kolektindaj por ni. Bildlibroj donacitaj al ni, sen iu rilato al Esperanto, ankaŭ *Encyclopaedia Britannica*, nuntempe ne plu uzata. Tio ĉi estas nun kolektata en unu loko kaj iam trovu la vojon al brokantejo en Roterdamo.

Esplorado: BHH servas por agadoj kaj eldonaĵoj de UEA, sed ankaŭ por la studado de esploroj ĝenerale. Kutime ni sendas (fakturitajn) fotokopiojn, se oni ne povas viziti la bibliotekon persone. La tuto da tiaj servoj estu nun rekonsiderata por trovi finan taŭgan kondiĉaron.

Financoj: Aparta problemo estas la tempa limigo de la posteno. Estas malfacile trovi eksterajn subvenciojn por tio. Sur la konto de la Fondaĵo Biblioteko estas bedaŭrinde malmulte da movo.

Foto-arkivo: Nia arkivo kun fotoj pri esperantistoj (kun diversaj gradoj de famenco), pri kongresoj, pri movadaj temoj kaj landaj asocioj povus esti multe pli uzata, se estus pli klara koncepto rilate al konservado kaj registrado. Kiel tiom ofte, ankaŭ ĝi estas problemo grandparte de labortempo.

Historio de BHH: Por kompreni la kolekton, necesas scii ion pri la historio. Kiam alvenis kiuj librodonaĵoj, kiel oni ĝis nun prizorgis la bibliotekon, kiom bonordis la translokiĝo de Genevo al Roterdamo, ĉu ekzistas studoj pri ĝi... la rezulto de tia serĉado estas iom longa artikolo pri la historio de BHH, kaj aperu en konvena formo.

Katalogo: La problemo de moderna, elektronika katalogo anstataŭanta la ĝisnunan povas supozeble esti solvata nur en kunlaboro kun aliaj Esperanto-bibliotekoj. La demando estas komplika kaj postulas multe da kunordigado.

Kompleteco: Certe, tia biblioteko estu iagrade kompleta. Precipe ĉagrenas ke ekzemple ankoraŭ mankas kelkaj

malnovaj numeroj de la revuo *Esperanto*; ŝajne oni ne ĉiam zorgis pri la konservado de specialaj numeroj (1920-aj, 1930-aj jaroj).

Konsulta Grupo: Malgranda grupo da movadaj spertuloj konsilas al la surloko, kaj krome multe da homoj subtenas.

Libroservo: La bibliotekisto kunlaboras kun la Libroservo, kiun nuntempe prizorgas Ionel Onet. La Libroservo de UEA, du etaĝojn sub mi, estas la plej grava fonto de novaj libroj, ĉar eldonisto kiu volas vendi ĉe ni, devas sendi ankaŭ du senpagajn ekzemplerojn: unu por recenzo en tiu ĉi revuo, la alian por Biblioteko Hector Hodler. Kaj se la Libroservo ne havas ion, oni transdonas la klienton al la fotokopia servo.

Mapigo kaj gvidilo: Niaj kolektoj entute troviĝas en pli ol dek ĉambroj de la domo. „Mapo“, nun verkata, donos al la bibliotekisto pli bonan superrigardon, ekzemple pri „ekzotikaj“ objektoj kiel kalendaroj aŭ afiŝoj.

Ordigado: Malfacilas vere ordigi se spacomanko estas karakterizaĵo de la biblioteko, sed mi ekzemple kunportas samajn aferojn, ĉiujn muzikkasedojn al unu loko ktp. Cetero mi instalas specialajn kolektojn, do rezervis bretojn por bibliotekistaj materialoj, plian breton por kongresaj libroj kaj dokumentoj kaj simile. Al la ordigado apartenas parte ankaŭ purigado.

Prezentado: Verki artikolojn por diversaj E-gazetoj, kaj tekstojn aperantajn sur la retpaĝoj. Por tiu celo ankaŭ preparado de trovaĵoj, skanitaj. Celo: interesi pri la kolekto kaj instigi al esplorado.

Raporto: Daŭre etaj rezultoj kaj ideoj eniras dosieron por posta raporto al ESF, kiu konsilu kiel estonte aranĝi la bibliotekon kaj la arkivon.

Revuo: Kun Stano Marček mi estas en konstanta kontakto, preparante aferojn por la Revuo. Ni jam preparolis novan historian rubrikon kun trovaĵoj el BHH.

Sondokumentoj: Estas relative facile registri pere de komputilo sonojn de sondiskoj (33 aŭ 45 rotacioj) aŭ sonkasedoj. Pli granda problemo estas diskoj je 78 rotacioj kaj precipe la malnovaj sonbendoj el la Magnetofona Servo de UEA. Sed iom post iom ekspluatigas tiu grandioza arkivo de Esperantaj voĉoj, kaj oni cerbumas kiel plej bone prezenti la rezultojn. Kroma defio estas la filmskatoloj ĵus trovitaj en ŝranko en la ĉambro Saft.

Vizitoj: Ne nur esperantistoj vizitas la bibliotekon. Se mi rajtas diri tion, precipe koncerne neesperantistojn mi sufiĉe hontas pri la terura aspekto de nia kolekto. Mi konsolas min pensante, ke mi estas ĉi tie eĉ ankoraŭ ne tri monatojn. Mi mem vizitos diversajn Esperanto-bibliotekojn kaj eventuale aliajn fakajn bibliotekojn en Eŭropo.

Novstila kongresa dimanĉo



Informado, Instruado, Utiligado

La Strategia Plano de UEA emfazas tri prioritatojn: Informadon, Instruadon kaj Utiligadon. Kion ni faras por plenumi tiujn prioritatojn en la Universala Kongreso? Nu, kelkajn novajn aferojn...

Novstila inaŭguro

En Gotenburgo, la kongresa inaŭguro okazos ne en la tradicia dimanĉa mateno sed en lundo. Kial? Interalie ĉar temas pri unu el la ĉefaj dumkongresaj okazaĵoj por prezenti nin al la ekstera mondo. Lokaj funkcioj en la urbaj instancoj, konsuloj – kaj ĵurnalistoj kaj televidistoj – emas veni al arangoj, kiuj okazas dum ilia laborsemajno, dum kapti ilin en somera dimanĉa mateno estas multe pli malfacile. Tiu arango havas avantaĝon ankaŭ en tio, ke ni havas unu tutan tagon por finfari la arangojn kun niaj propraj homoj – elserĉi salutantojn de la diversaj landaj movadoj, interrilati kun parolantoj, k.s. La rezulto estos espereble ne nur novstila sed signife pli polurita arango. Tiel ni ne nur informos la eksteran publikon pri nia ekzisto kaj pri la graveco de nia laboro, sed ni ankaŭ faros tion kun maksimumaj digno kaj trafa.

Tago por lerni kaj utiligi la lingvon

Dimanĉon ni utiligos parte por la tradiciaj aferoj – la Nacia Vespero, diservoj en la posttagmezo – sed plejparte ĝi estos dediĉita al la rolo da informaj kunsidoj pri temoj interesaj al aktivaj esperantistoj, ekzemple pri informado pri Esperanto, pri lingvoj, pri la kongreslanda kulturo, pri kiel organizi lokan agadon, pri Esperanto-literaturo, kaj plej diversaj aliaj temoj. La celo de la tago estos lernado kaj instruado (vi povos lerni pri la lingvo) kaj utiligado (vi pliriĝigos viajn proprajn sciojn pere de Esperanto) – kaj ankaŭ certagrade informado, ĉar dum la tago vi povos lerni kiel pli efike fari la informan laboron por Esperanto. Sed ĉefe la tago estos por ĝui – la lingvon, la kuneston kun aliaj esperantistoj, la kongreson. Ni invitus vin al plena partopreno en tiu ĉi riĉa kaj bunta tago!

Humphrey Tonkin

Survoje al IJK kaj UK atendas vin la
HAMBURGA SOMERO 17.–25.7.2003

Nia Urbo – Nia Vivmedio

Informilo kaj aliĝilo ĉe

www.esperanto.de/hamburg

aŭ: HES, Klaus-Groth-Str. 95, DE-20535 Hamburg



Vizitantoj de BHH: Gubbins, van Oostendorp, M. Lins, Tonkin, Bakker-ten Hagen.

de UEA – Informado, Instruado, Utiligado. Ni nomis tiun unuan parton *La Laboro*. La bazo de la agado de la Asocio, la motoro de tiu laboro, estas kompreneble ĝiaj financoj kaj administrado, kaj la decidofara Komitato – sed ĉio ĉi ekzistas por atingi la celojn de la Asocio, kiuj, laŭ la Statuto estas (a) *disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto*, (b) *agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj*, (c) *plifaciligi la ĉiuspecajn spiritaĵojn kaj materiaĵojn rilatojn inter siaj homoj*, kaj (ĉ) *kreskigi inter (la) membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj*. Tiun bazon ni traktas en la dua parto de la raporto, *La Organiza Bazo*.

Renato Corsetti
Prezidanto

1. La Laboro

1.1. Informado

Pri informado respondecis la estrarano Andrej Grigorjevskij. En la informado, la jaro 2002 estis la jaro de interreto: UEA faris grandan salton antaŭen. Post longaj traktadoj en junio 2002 ĝi transprenis la administradon de la retejo www.esperanto.net, konstruita kiel multlingva inform-centro pri Esperanto. Dank' al laboro de kelkaj kapablaj kaj celkonsciaj volontuloj la retejo ekhavis multe pli belan kaj modernan aspekton kaj la kvanto de naciaj lingvoj, en kiuj estas donataj bazaj informoj pri Esperanto, kreskis ĝis 57. La retejo allogis ĉiam pli grandan atenton, averaĝe vizitata en 2002 de pli ol 30 000 personoj ĉiumonate. En la retaj serĉmaŝinoj ĝi okupas la unuan linion en la serĉrezultoj de la vorto *Esperanto*.

En julio UEA lanĉis alian gravan provon kvalite progresigi Esperanton en interreto kaj helpi al membroj kaj nemembroj de la Asocio produktive utiligi la lingvon. Temas pri la retejo *Abonu.com*, kiu ekservis kiel senpaga reta gastigejo kaj abonejo por retaj gazetoj en Esperanto. Fine de la jaro la retejo havis ĉ. 500 abonantojn el 40 landoj, pere de ĝi estis dissendataj 300 diverstemaj retgazetoj. Tiu ĉi senprecedenca kresko en la kvanto de informoj pri kaj per Esperanto povus havi implicojn vere revoluciajn.

Estis draste evoluigata ankaŭ la retejo www.uea.org. En ĝi regule aperis la kongresaj informoj de UEA, funkciis la Reta Katalogo de la Libroservo, troviĝis abundaj dokumentoj (informiloj, regularoj, kongresaj raportoj, ktp) kaj aperis ĉiumonate kelkaj ĉefaj artikoloj el la revuo *Esperanto*, tiel ke eĉ antaŭ sia apero en presita formo la revuo fariĝis parte alirebla. Unuafoje en 2002 estis rimarkite, ke la kvanto de retaj mendoj al la Libroservo superis duonon de la tuto kaj retaj aliĝoj al la Universala Kongreso alproksimiĝis al duono.

Ekspluatado de interreto estas natura kaj avantaĝa rolo por UEA kiel internacia organizaĵo, sed ankaŭ la landaj asocioj kaj eĉ unuopaj esperantistoj pli kaj pli abunde kaj efike laboras tiucele, tiel ke estas troveblaj pere de la reto multe pli abundaj kaj fidindaj informoj pri Esperanto ol estis antaŭe alireblaj per paperaj rimedoj, kiel ekzemple enciklopedioj. Sur pli tradiciaj terenoj, la Informa Agado de UEA en 2002 antaŭ ĉio estis la agado de la membroj en siaj landoj. Inter tiuj elstaris ekzemple brazilaj manifestacioj kadre de la Monda Socia Forumo en Porto



Alegro, kaj tiuj italaj esperantistoj-katolikoj, kiuj vidigis ĉe televido per naŭ ŝildoj la vorton *Esperanto* sur la placo de Sankta Petro. En Italio rimarkinda estis ankaŭ la agado de Giorgio Bronzetti, la prizorganto de itala agentejo "Disvastigo". Daŭre imitindas amasaj por-publikaj Lingvaj Festivaloj en Rusio, Francio, Svedio, Serbio kaj kelkaj aliaj landoj – kun ilia nova versio: Festivaloj de Intereso.

UEA estis la ĉefa financa subtenanto de la nova Brusela Komunikad-centro (BKC), funkciigita de Eŭropa Esperanto-Unio. Per gazetaraj komunikoj kaj speciale tajlitaj artikoloj, la centro trafe ekspluatis la lingvo-raĵtan temon en Eŭropo por altri gazetaran atenton al la problemo de neŭtrala internacia lingvo. Rezultis dekoj kaj eĉ centoj da artikoloj kaj mencioj pri Esperanto kaj UEA en pluraj amaskomunikiloj de Eŭropa Unio kaj aliaj mondopartoj. La agado de la centro donis ankaŭ bonajn argumentojn por la lokaj Esperanto-informservoj tra la tuta mondo.

Komence de 2002 aperis aktualigita versio de la varbilo *Ĝisdate pri Esperanto*, verkita de Humphrey Tonkin. La informilo gajnis vastan rekonon en la movado kaj estis tradukita al 23 lingvoj (aktuale, en 2003, 24 lingvoj) – i. a. helpe de BKC. La Praga Manifesto, konciza deklaro de la principoj de UEA, estas nun havebla en 55 lingvoj. En aprilo 2002 UEA publikigis kiel Esperanto-dokumenton la artikolon de konata neesperantista lingvisto Robert Phillipson *Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj*.

1.2 Instruado

Respondeca estrarano estis Gbego Koffi. Reprezentanto de la Instruista Ligo ILEI ĉe la estraro de UEA estis Mauro La Torre. Laŭ la Strategia Laborplano de UEA, la kampo instruado signifas atingi, ke lerniloj kaj lern-okazoj – inkluzive de *Esperanto-renkontiĝoj* – estu facile troveblaj kaj allogaj por la celataj homoj.

Necesas distingi du sistemojn en la eduka kampo: la naciajn kaj la internacian. Iuj landaj asocioj jam havas bone organizitajn edukajn strukturojn, dum en aliaj nur kelkaj esperantistoj sporade instruas. La internacian sistemon principe prizorgas la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kiel faka organizaĵo de UEA, kaj aliaj institucioj de la Esperanto-komunumo (Esperantic Studies Foundation, E@I-grupo de TEJO, Internacia Esperanto-Instituto, Indigenaj Dialogoj, Akademio Internacia de la Sciencoj, universitataj katedroj kiuj havas interlingvistikon en sia programo, kulturcentroj kaj Esperanto-kursejoj). ILEI havas sian reprezentanton ĉe la Estraro de UEA, d-ron Mauro La Torre. Gravan paŝon antaŭen faras pluraj projektoj de perkomputila lernado de Esperanto (vidu sub Esploro kaj dokumentado).

La laboro de ILEI en difinita lando kaj tiu de la landa asocio ne forpuŝu unu la alian. Necesas kunlaboro de ambaŭ instancoj. Tial ILEI kaj UEA klopodas havi en ĉiu lando grupon zorgantan pri la eduka kampo. Tiucele la Afrika Oficejo de UEA dissendis enketilojn al landaj asocioj kaj kluboj, kiuj respondu pri la eduka kampo en la respektivaj landoj. Kvankam respondoj jam alvenas al la Afrika Oficejo, tamen multaj adresitoj ĝis la fino de la jaro ankoraŭ ne reagis. El la jam ricevitaj respondoj oni povas havi la impreson, ke nur kelkaj landoj havas bone organizitan edukajn strukturon, dum en aliaj ekzistas nenio por organizi la instruadon. UEA/ILEI uzos la rezultojn de la esploroj por plani pli efikan

helpon al la diversaj landoj. La internaciajn element- kaj meznivelajn ekzamenojn prizorgas la Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI/UEA. Prioritata estas klara difino de la lernostupoj de UEA/ILEI. Diskutoj en la subkomitato pri instruado kaj en aliaj diskutolistoj kondukis al propono de tri niveloj en la internacia sistemo: la elementa, meza kaj supera niveloj. La elementa kaj meza jam funkcias, kaj la supera estas en preparo. Trejnkursoj de instruistoj estos parto de la supera nivelo, kiu havos plurajn branĉojn. La diploma seminario de IEI estos parto de tiu supera nivelo.

Neforgesindas landoj kun neniu instru-agado. Estas proponata enkonduka nivelo al la internacia sistemo, kun minimuma programo de instrulementoj. Kontaktoj ekzistas kun zorgantoj pri edukado en kelkaj landoj, kiuj provos eksperimenti per tiu materialo. Post la eksperimentoj estas antaŭvidebla la disponigo de la fina materialo al ĉiuj instruemuloj en landoj kaj en lingvoj sen tradicio pri instruado de Esperanto. En tiu nivelo estas rimarkinda la uzo de retaj kursoj, kiuj en pluraj mondopartoj jam estas la fonto absolute plej grava je lernintoj de Esperanto.

Dum la nuna ĝenerale priskribas la ekzamenojn elementan kaj mezan, necesas do havi ion pri trejnkurso por instruistoj. Propono nun skiziĝas, kaj la komitato de ILEI en sia venonta sesio decidos. Estas necese ke la Komitato de UEA konsideru ĝin kaj aplikadon de la Regularo pri Ekzamenoj pri Instruikapablo, kaj donu subtenon al ILEI kaj IEK por plua realigado. Alia grava afero kiu ne povis realiĝi malgraŭ la multaj avokoj tiucele, estas starigo de komisiono pri instruado aŭ nomigo de komisiito pri instruado helpe al tiukampa estrarano.

La projekto Interkulturo, kun subvencio de ESF, daŭras kiel Interkulturo II (IK2), kiu kunlaborigas ILEI, TEJO-E@I kaj la Afrikan Oficejon de UEA. Aktuale estas konstruata nova retpagaro de Interkulturo (www.interkulturo.net) kaj difinata interkultura metodiko, kiu estos testata per 5-10 provklasoj dum la finaj monatoj de 2003 kaj plene aplikata ekde 2004. Trejnseminarioj por interkultur-edukantoj kaj helpantoj okazos en Svedio en aŭgusto 2003, Brazilo en decembro 2003, kaj Bosnio komence de 2004, kun ankoraŭ planeblaj novaj IK-trejnseminarioj subvenciotaj de institucioj kiuj subtenas interkulturan edukadon. Dume la Afrika Oficejo kolektas novajn partoprenantojn. Pli ol kvin klasoj jam aliĝis.

1. 3 Utiligado: Faka Agado

Respondeca estrarano pri faka agado estis Ivo Osibov. Se UEA trairas periodon en kiu aperas novaj organizaj formoj, tiu ĉi ŝanĝo estas eĉ pli evidenta en la faka agado, kie la praktika uzado de Esperanto por ligi kolegojn el diversaj mondopartoj kaj por trakti fakajn demandojn rapide intensiĝas pere de la interreto, tiel ke nuntempe estas malfacile distingi inter fakaj grupoj, fakaj retlistoj kaj la oficialaj fakaj organizaĵoj, kaj membreco en fakaj organizaĵoj fariĝas malpli grava ol efektiva



partopreno en la praktika utiligo. Vigle funkcias dekoj da fakaj retlistoj. Aliflanke, en la Universala Kongreso en Fortalezo okazis minimume 32 malsamaj "tradiciaj" fakaj kunvenoj, kiuj diskutis pri la pluraj kampoj, en kiuj Esperanto estas utiligata. Okazis sub egido de UEA ankaŭ la kvina kunveno de la Strategia Forumo de la Esperanto-Komunumo, kiu grupigas ĉiujn asociojn, kiuj agas per aŭ por Esperanto. Prelegis en ĝi Bessie Schadee pri la problemoj de neesperantista organizaĵo (tiel difinas sin Indigenaj Dialogoj), kiu tamen uzas Esperanton. Wera Blanke kaj Vincent Charlot parolis pri alia speco de organizaĵo: ATTAC, kaj pri la agado de esperantistoj en la kadro de la naciaj ATTAC-asocioj. Fine la sama Wera Blanke parolis ankaŭ pri terminologia laboro, temo, kiu daŭre estas en la atento de fakaj asocioj.

La nura faka asocio, kiu dum la jaro menciinde malaperis, estis Monda Turismo, kiu tamen ili renaskiĝis el siaj cindroj sub la nomo Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz, Pollando. Nun necesas formale prezenti al la Komitato la ŝanĝon de nomo kaj de asocia kategorio.

Dum la jaro refirmiĝis kelkaj el la agadoj de la unuopaj fakaj asocioj. Preterlasante la jam menciitan interreton, necesas atentigi pri komercistoj, kuracistoj kaj medicinistoj, kiuj kune kun la fervojistoj tenas bonan nivelon de agado. Kontaktoj inter UEA kaj la fakoj restis je bona nivelo, kvankam ĉiu rekonas la neceson intensigi la fakan agadon per Esperanto, kaj trovi manieron subteni novajn iniciatojn.

1.4 Utiligado: Kulturo

Respondeca estrarano estis Gbego Koffi. Kunlaboris ankaŭ Humphrey Tonkin, kiu en kunlaboro kun aliaj estraranoj pretigis por la Fortaleza Universala Kongreso priskribon de la kultura agado de UEA, kiu estis poste akceptita de la Komitato. Temis pri ambicia elpaŝo, rilate la lingvon (ekzemple, *UEA havas intereson disvastigi la verkojn de Zamenhof kaj aliajn modelajn tekstojn, kiuj kontribuas al la efika evoluigo de la lingvo*), la literaturon (*UEA havas respondecon ... instigi la verkadon de bonkvalitaj verkoj... ĝi ankaŭ havas respondecon ... kunordigi kaj instigi la eldonadon de Esperanto-verkoj*), teatron (*En diaspora movado kun malgrandaj grupiĝoj de homoj, necesas evoluigi pli intimajn teatrajn spektaklojn*), la aliajn artojn, kaj la historion (*La asocio havas respondecon konservi kaj konigi la heredaĵon de Esperanto*). Espereble jam en 2003 oni komencos vidi rezultojn.

La Komitato ankaŭ rekomendis starigon de eldona politiko, super kiu la Estraro ankoraŭ laboras. Laŭ komitata rekomendo, la estrarano pri kulturo ankaŭ kompilas liston de pli ol tridek kursejoj kaj Esperanto-kulturcentroj, nun alireblan ĉe la retpagaro de la Asocio.

Inter la abundaj kulturaj aranĝoj en la 87-a Universala Kongreso en Fortalezo estis du teatraj prezentoj, prezento de la poezio de la brazilaj verkistoj Castro Alves kaj Milla Ramos, danca prezento de la baleto *Du jarazonoj* de la trupo Edisca, koncerto de la multalentaj brazilaj esperantistoj, kaj la kutimaj Nacia kaj Internacia Vesperoj. Aŭtoroj de novaj verkoj prezentiĝis ĉe la Libroservo en la kutimaj Aŭtoraj Duonhoroj. La Esperantologia Konferenco estis dediĉita al la Esperanto-kulturo: podia diskuto kunvenigis reprezentantojn de esperantlingva radio, teatro,

kanto, eldonado kaj verkado. Ankaŭ la Internacia Kongresa Universitato, sub rektoreco de José Passini, havis siajn prikulturajn prelegojn. La 53-an serion de Belartaj Konkursoj partoprenis pli ol kvardek homoj. La detalaj rezultoj aperis en la revuo *Esperanto* de septembro, p. 181. La premio Deguč, disponigita de la japana religia organizaĵo Oomoto, iris al s-roj Ma Young-tae kaj Lee Jung-ki (Koreio), dum la subvencio Cigno al la Amerika Oficejo de UEA. Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen subvenciis dek Esperanto-bibliotekojn en dek landoj: en Armenio, Brazilo, Ĉinio, Demokratia Respubliko Kongo, Kolombio, Litovio, Niĝerio, Rumanio, Rusio kaj Ukrainio. Konkursis 18 bibliotekoj el 14 landoj. Detaloj pri la premioj aperis en la revuo *Esperanto* de februaro 2003, p. 40.

Ne nur en la Universala Kongreso okazis artaj prezentoj: ankaŭ en arangoj de landaj asocioj kaj ĉi loka nivelo – eĉ ĝis prezento de adaptita versio de *Reĝo Lear* en Vjetnamio sub gvido de la honora membro de UEA poeto Dao Anh Kha (revuo *Esperanto*, februaro 2002, p. 40).

La eldona agado de UEA en 2002 bone respegulis la Strategian Planon. Titoloj pri aspektoj de instruado estis la tuj furora *Vojaĝo en Esperanto-lando* de Boris Kolker kaj reeldono de la lernolibro *Saluton!* de Audrey Childs-Mee. La verko *Esperanta frazeologio* de germana fakulo pri lingvistiko Sabine Fiedler ekzamenis tiun lingvan fenomenon en Esperanto. Traduko de malgranda libro de la Eŭropa Burao de Malpli Uzataj Lingvoj, *Diskutlibro pri malpli uzataj lingvoj*, bone utilis por interna informado pri la lingva situacio precipe en Eŭropo kaj konsistigis edukon utiligon de la lingvo Esperanto. Geoffrey Sutton ankaŭ pretigis por eldono ĝisdatigon de la bibliografio de Ockey pri Esperanto-vortaroj kaj terminaroj. La kompleta prelegaro de la Internacia Kongresa Universitato en Fortalezo aperis sub redakto de Roy McCoy. La reĥo de libro eldonita en 2001, la dua eldono de *Maskerado ĉirkaŭ la morto* de Tivadar Soros, en redakto de Humphrey Tonkin, daŭris en 2002: post la tradukoj en la anglan, rusan kaj turkan, aperis traduko en la hungaran en 2002 kaj estis anoncita traduko en la germanan ĉe la granda eldonejo DVA.

1.5 Informado kaj Utiligado: Kongresoj

La 87-a Universala Kongreso en Fortalezo, Brazilo, grupigis 1484 aliĝintojn el 58 landoj el ĉiuj partoj de la mondo – pli bona rezulto, ol oni antaŭvidis. Ĝi donis eblon al 868 brazilaj esperantistoj, el kiuj multaj ne ofte havas okazon partopreni tiajn kongresojn, senpere travivi kunvivadon en bunta internacia komunumo. Aparte menciindas la juneca etoso kiun donis al la Kongreso ĝuste multnombraj brazilaj gejunuloj. Aliflanke, malpli kontentiga estis partopreno el aliaj partoj de Suda Ameriko, pro la ekonomiaj kondiĉoj en diversaj landoj, la altaj kostoj, kaj la longaj distancoj. La membraro kaj la organoj de UEA en diversaj kunvenoj kaj forumoj pridiskutis la kongresan temon (*Diverseco – ŝanco, ne minaco*), la laboron de la Asocio, problemojn kiujn ĝi renkontas kaj ĝian perspektivon. Okazis minimume 32 diversaj fakaj kunsejnoj. En la kadro de IKU kaj AIS okazis 16 sciencaj prelegoj. Estis prezentitaj 2 teatraĵoj. La libroservo vendis librojn valorajn pli ol 75 000 realojn. En la Belartaj Konkursoj, Oratora Konkurso kaj Internacia Art Vespero esperantistoj mem aktive partoprenis en kreado de Esperanta kulturo. Okazis entute 35



Foto: Stano Marček

La Komitato dum la 87-a UK en Fortalezo

ekskursoj kun 929 ekskursantoj. La gazetaro kaj televidaj retoj informis pri la Kongreso. La unuan fojon la Kongreso povis esti sekvata sur la reto. La kongresa kuriero, krom 6 numeroj presitaj, aperis ĉiutage ankaŭ en retpaĝaro. Pli kompleta raporto pri la kongreso aperis, kiel kutime, en la septembra numero de la revuo *Esperanto*.

Planoj por estontaj kongresoj (Gotenburgo 2003, Pekino 2004, Vilno 2005) kontentige komenciĝis al pluiris. La financaj kaj informaj reĥoj el la pasintjara kongreso en Zagrebo estis pozitivaj. Estrarano pri kongresoj estis Ivo Osibov, kvankam ankaŭ aliaj estraranoj kunlaboris en tiu ĉi fako.

1.6 Informado kaj Utiligado: Eksteraj Rilatoj

La ekstera agado de la Asocio celis ĉefe informadon kaj la praktikan utiligadon de la lingvo Esperanto. La respondeca estrarano pri eksteraj rilatoj estis Lee Chong-Yeong, kiu laboris surbaze de gvidlinioj de la Subkomitato pri Eksteraj Rilatoj. La laboro ĉefe koncentriĝis ĉe la grandaj interregistaraj organizaĵoj. Bonaj rilatoj kun Unesko (sub gvido de Vincent Charlot en Parizo) rezultigis partoprenon de reprezentanto de tiu organizaĵo, Patrick Gallaud, Ĝenerala Sekretario de la Monda Federacio de Unesko-Asocio, en la Universala Kongreso en Fortalezo (la salutmesaĝo de Unesko aperis en la septembra numero de la revuo *Esperanto*, p. 174). S-ro Gallaud restis la tutan kongresan semajnon, kaj kelkfoje prelegis kaj intervenis, ekzemple kunlige kun diskuto de la kongresa temo, kiu traktis i. a. la kulturen diversecon (ankaŭ aperis en la septembra numero de la revuo traduko de la Universala Deklaracio de Unesko pri Kultura Diverseco). Kune kun reprezentantoj de UEA s-ro Gallaud planis pluan kunlaboron inter UEA kaj la Unesko-asocioj tra la mondo, kaj li kronis la semajnon per parolado en la ferma kunsido de la kongreso en bona Esperanto.

UEA aranĝis prezenton de la programo Indiĝenaj Dialogoj ĉe kunsido de Unesko en Parizo fine de novembro, kaj nun laboras por ke Esperanto, ne kiel lingvo sed kiel kulturo kaj movado, estu rekonata de Unesko kiel *nemateria kultura heredaĵo*, en la kadro de tiel titolita programo de Unesko.

Laŭ peto de UEA, la Azia Civilsocio Forumo de CONGO, la Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kiu okazis en decembro en Bangkoko, Tajlando, enprogramigis rondan tablon *Lingvo kaj Homaj Rajtoj*, kiun gvidis reprezentantoj de UEA kaj de la Oficejo de la Altkomisito pri Homaj Rajtoj de UN (ĉe la retpaĝaro de la Alta Komisiono troviĝas la Esperanto-traduko de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj: <http://www.unhchr.ch/udhr/lang/1115.htm>). La ĉeestantoj en Tajlando akceptis rezolucion, kiu rekomendis, ke UN diskutu la lingvajn aspektojn de homaj rajtoj en unu el siaj venontaj kunsidoj, kaj ke internaciaj neregistaraj organizaĵoj kunlaboru pri tio (www.acsf.net -> download -> newsletter 3, kaj 5). Utiligante la privilegion de organizaĵo en konsultaj rilatoj kun UN, Prezidanto Corsetti formale transsendis la koncernajn rekomendojn al la Ĝenerala Sekretario de UN, kaj al la prezidanto de la Komisiono pri Homaj Rajtoj, petante ke ili atentigu la ŝtatojn-membrojn. UEA ankaŭ laboras por starigi en CONGO laborgrupon pri lingvo kaj homaj rajtoj. Kiel baza referencaĵo por la estonta agado ĉe internaciaj organizaĵoj, la Asocio nuntempe kompilas kolekton de pri-Esperantaj rezolucioj de internaciaj organizaĵoj ekde 1920 ĝis 2002. La agadon en Novjorko prizorgis malgranda oficejo de UEA sub volontula gvido de s-ino Rochelle Grossman kaj s-ro Thomas Eccardt.

Pere de la Brusela Komunikad-Centro, sub gvido de Dafydd ap Fergus, oni flegis la rilatojn kun la instancoj de la Eŭropa Unio (EU), kiuj konkretiĝis en 2003 en la partopreno de la prezidanto de UEA en kunveno pri eŭropa lingvopolitiko aranĝita de la Komisiono de EU. Sub aŭspicio de la Eŭropa Parlamento, ankaŭ okazis *Simpozio pri Lingva Politiko de Eŭropa Unio* en la domo de la Eŭropa Parlamento, ĉe iniciato de la Laborgrupo por Lingvaj Problemoj de EU, finance subvencita de Miyoshi Etsuo, kiu ankaŭ lanĉis reklaman kampanjon pri Esperanto ĉe EU.

En preparo por 2004 estas la tria Nitobe-Simpozio pri la Lingvaj Problemoj en Interŝtataj Organizaĵoj, finance subvencita de japana mecenato kaj okazonta dum la Universala Kongreso en

Pekino. La simpozio ĉefe celos reprezentantojn de UN, EU kaj Unesko, por montri al ili kiel UK, granda internacia konferenco, funkcias sen lingvaj problemoj.

1.7 Informado, Instruado, Utiligado:

Landa kaj Regiona Agado

La laboro en la landoj kaj regionoj ligiĝas al ĉiuj tri ĉefaj celoj de la Asocio: informado, instruado kaj utiligado. En 2002 la Asocio laboris per du ĉefaj rimedoj: (a) siaj regionaj komisionoj, kiuj kunordigas la laboron en la diversaj landoj, kaj (b) siaj rektaj rilatoj kun landaj asocioj. Estrarano Michela Lipari respondecis pri ambaŭ terenoj. Ilin suplementis la intensa agado de s-ro Wu Guojiang, komisiito de UEA pri ĝemelaj urboj, kiu tre aktive klopodas kaj interligitaj esperantistojn el urboj, kiuj jam havas ĝemelajn rilatojn, kaj instigi al kreo de novaj ĝemelaj kontaktoj. Li ankaŭ redaktas regulan retan bultenon por informi pri la evoluo de la diversaj iniciatoj tra la mondo.

Afriko

UEA daŭre ludas gravan kunordigan rolon en Afriko – kontinento, kie nove floras la interesiĝo pri Esperanto (parte dank' al la potenco de interreto). Sub gvido de estrarano Gbego Koffi, la Afrika Komisiono de UEA starigis laborgrupojn pri instruado, junularo, financoj, kaj eksteraj rilatoj. La kuriero de la komisiono (*KUKO*) aperis kvarfoje en la jaro, kaj la Komisiono tenis supermigardon super la Afrika Oficejo (AO) de UEA, en Togolando. En sia ĉiutaga funkcio, la Afrika Oficejo faras multon por la afrikaj esperantistoj, kies nombro daŭre kreskas. Alvenas multaj leteroj kaj retmesaĝoj de afrikanoj neesperantistaj kaj esperantistaj, ilin siansteme respondis la oficeistoj en Roterdamo, sed nun la AO-laborantoj.

La afrikaj korespondantoj ankaŭ demandas pri la Esperanto-movado. Komencantoj volas perfektigi sian lingvoscion kaj petas instruadon perkorespondan. Iuj naciaj asocioj petas al AO helpi pri organizado de kongreso aŭ nacia arango. Ankaŭ venas leteroj de ekster-afrikaj esperantistoj kiuj scivolas pri la afrika movado. Foje iu bonvolulo deziras helpi al afrikano sed bezonas informojn pri liaj meritoj. AO batalas, por ke afrikanoj finlunu perfekte la lingvon, parolu, skribu kaj komprenu ĝin senerare. Tial ĝi organizas kursojn por komencantoj kaj por progresantoj. Por progresantoj ekzemple, inter aliaj metodoj la AO uzas korektadon de leteroj fare de esperantistoj – kiel faradis Hans Bakker antaŭe – kun aldono de klarigoj pri la eraroj faritaj ĉefe koncerne gramatikajn punktojn.

Dumlonge Afriko "mankas" en la Esperanto-kulturo. Tial AO okupiĝas pri diskonigado de la afrika kulturo pere de eldono de verkoj de afrikanoj, interalie la Kajeroj de la 8-a kaj 9-a Togolanda Esperanto-Kongresoj (2000 kaj 2001), kaj la libretoj *La Koko Kantas*, *La Unuan Fojon*, *La CO de UEA en vortoj*, *Kiam Bestoj Parolis*, *Togolando fabelas* ktp. Kuŝas pretaj en la AO aliaj verkoj, sed mankas adekvataj financaj rimedoj por aperi ĝin.

AO redaktas/enpaĝigas periodaĵojn de afrikaj Esperanto-grupoj: la informilon *Alvoko* de la togolanda Esperanto-movado, la trilingvan periodaĵon *Tr'Afrik'*, kiu montras paŝojn de Esperanto sur la afrika kontinento, kaj la periodaĵon *Ondo da Vero* de la eduka instituto TIEFO. AO ankaŭ dissendas, laŭkomisie de UEA, rutinajn cirkulerajn de la Asocio. Ĉiutinda estas ĝia kunlaboro kun la instruista asocio ILEI en la revigligo de ILEI-sekcioj, starigo de edukaj fakoj ĉe landaj asocioj, kaj planado de kampanjoj ĉe Unesko-lernejoj.

AO disdonas subvenciojn de UEA al la aktivaj kluboj en Afriko. Ĝi kontrolas ĉu tiuj kluboj estas vere viglaj kaj helpas al tio. La kluboj estas foje rondoj de amikoj kiuj helpas unu la aliajn en malfacilaj vivkondiĉoj, ekzemple Esperanto-kluboj kiuj kreiĝis en rifuĝejoj en orienta kaj suda Afriko. Militoj forpelis multajn afrikanojn al tiuj rifuĝejoj kie ili vivas mizere kaj sen perspektivo. Esperanto redonas al ili iom da espero. Fakte, esperantistoj abundas en rifuĝejoj, kaj aktive agadas. En Burundio, Tanzanio, Zimbabvo kaj Demokratia Kongolando svarmas tiaj rifuĝejoj. La tanzaniaj esperantistoj eĉ fondis unuigilon, kies esenca tasko estas kunordigi la laborojn de la rifuĝejaĵoj.



Multas la malfacilaĵoj ĉefe financaj, sed la Afrika Oficejo obstine daŭrigas sian malfacilan vojon, esperante ĉiam ke la ĉielo sereniĝos iam. AO esperas pri kreado de Afrika Kapitalo, simila al la Azia Kapitalo. Jam estas kolektita ĉe UEA sumo de kelkdek miloj da eŭroj. Se iuj mecenatoj kreskigus ĝin al kelkcentmiloj da eŭroj, la rento certigus ke neniam Esperanto en Afriko mortos por monmanko.

Inter la agado en la unuopaj landoj menciindas Benino kaj Tanzanio, kiuj ambaŭ okazigis siajn unuajn naciajn kongresojn. La ĝenerala asembleo de la benina landa asocio BEF elektis novan estraron gvidatan de d-ro Gbozo Clement. Okazas Esperanto-kursoj en lernejoj: la Orfa Lernejo Esperantista, kaj Lernejoj en Kodji kaj Aguidahoue. En Niĝerio kaj Demokratia Kongolando keltigis novaj estraroj, ĉi-lasta sub gvido de Emile Malanda. La lernejo Oredo, Niĝerio, disponigas Esperanto-kursojn al siaj lernantoj.

En Togolando okazis la 10-a nacia kongreso. Funkciis ILEI-sekcio, kiu samtempe estis la eduka fako de la lando asocio. Kursoj okazis regule en kluboj, kaj ekzamenoj naciaj kaj internaciaj. Oni planas kursojn por gvidantoj de porinfanaj kursoj. En Malagasio, kvankam la jaro estis iom problema, la landa asocio okazigis sian 2-an naciaan kongreson. Ankaŭ la sudafrikaj esperantistoj ne silentis: partopreninte ties naciaan kongreson, grimabvono Bernard Londoni fondis kaj nun gvidas Esperanto-klubon en Harare.

Michel Dialundama gvidis kursojn en Kongo-Brazzaville, kaj funkcias tie ankaŭ alia grupo kun la nomo EAKO. Okazis en Senegalio agado gvidata de Alphonse Diatta, kun helpo de franca vizitanto, Arnaud Lagrange. La ganaaj esperantistoj klopodis aktivigi la landan asocion. La klubo Nova Aero kaj la klubo de s-ro Tuo en la urbo Buake daŭrigas siajn klopodojn en Kotdivuaro (Ebura Bordo). Leterojn al ministerioj kaj aliaj instancoj dissendis la prezidanto de AEK Jean-Marie Mboge en Kamerunio.

Ameriko

UEA grave kontribuis al la amerika movado per du iniciatoj en 2002. Unue, en majo malfermiĝis Amerika Oficejo de UEA en Brazilo, en unu el la ĉambroj de la sidejo de Brazilia Esperanto-Ligo. Ĝi celas kunordigi la agadojn en la kontinento, puŝi novajn iniciatojn, daŭre eldoni la bultenon AktivAmeriko kaj antaŭenigi informkampanjojn de UEA. Dum la jara kunveno de la Amerika Komisiono de UEA, okazinta dum la Fortaleza Universala Kongreso, gvidanto fariĝis la talenta Adonis Saliba (Brazilo).

Due, okazigo de la Universala Kongreso de UEA en Fortalezo, Brazilo, kaj de la Internacia Junulara Kongreso en Pato Branco, Brazilo, estus la pinto de la pluraj eventoj raportindaj en tiu ĉi ĉapitro, sed pri ili oni povas legi aliloke. Je pli regiona nivelo, okazis komuna kongreso de kolombiaj kaj venezuelaĵaj esperantistoj: tre longdaŭra kongreso, ĉar, laŭ ies vortoj ĝi

ankoraŭ ne finiĝas: ĝi daŭras per intensa komunikado interreta kiu estas tre promesplena je novaj iniciatoj. Tiu ĉi formo de agado: vizagalvizaĝa interkomunikado sekvata de intensa reta kunlaboro, prezentas modelon por la estonteco.

Al la landoj kie okazas Esperanto-agado aldoniĝis nova lando: Esperanto estas nun instruata en la urbo Asunción, Paragvajo. En Kubo la esperantistoj laboris la tutan jaron cele al pretigo de la Sesa Amerika Kongreso en 2004. La kolombia dojeno, Rafael Mejia, vojaĝis al Ekvadoro por instrui Esperanton, dum Addano Cordeiro partoprenis en la Somera Kursaro de Esperanto en Vermont (Usono) dank' al subteno de la Fondaĵo Ameriko en la kadro de la agado "klerigo de aktivuloj". La sama fondaĵo subtenis la disponigon de lego- kaj lernomaterialo al Haitio, Nikaragvo kaj Paragvajo. La Somera Kursaro, la t.n. Nord-Amerikaj Someraj Kursoj (NASK), transmigris el Sanfrancisko al Vermonto ĉi-jare, kie ili bone instaligis en la t.n. *School for International Training*, malgranda universitatnivela internacia eduکهje.

Arabio

La juna Araba Komisiono de UEA, sub gvido de Trude Sinno, aktive laboris por pretigi la terenon al grava agado en tiu mondoparto, kaj dank' al instigo de la gvidanto de la komisiono, la revuo *Kontakto* dediĉitis numeron al la araba mondo. Ĉi-jare la komisiono enfokusigis sian atenton al Maroko, per anoncoj en tagĵurnaloj pri korespondaj kursoj. Rezulte, pluraj personoj nun lernas Esperanton kaj komenciĝis preparlaboroj por okazigo de Seminario pri Esperanto, okazonta en julio 2003. Kunlabore kun Agado Espero de UEA la araba komisiono lanĉis la kampanjon *Lughatu-ssalam* por helpi militviktimojn.


Kroman mencion meritas la nova Jordana Esperanto-Asocio, kiu starigis propran hejmpaĝon.

Azio

La ĉefa kunordiganto de agado en Azio, la Komisiono por la Azia Esperanto-Movado (KAEM) havis ses komisionanojn el Japanio, Ĉinio, Koreio, Vjetnamio, Barato kaj Pakistano kaj kelkajn subkomisionanojn en Japanio. Ĝin prezidis Hori Yasuo el Japanio kaj la vicprezidanto estis Tran Quan Ngoc el Vjetnamio. Por eviti disperdon de fortoj por neorganizita laboro, tiu ĉi komisiono de UEA laboris laŭ klaraj prioritataj projektoj jam antaŭe difinitaj.

Projekto A rilatis al kunlaboro de aliĝintaj landaj asocioj. La bulteno *Esperanto en Azio* estis eldonita trifoje kaj sendata al ĉirkaŭ 500 legantoj. Estis ankaŭ starigita retpaĝaro dank' al kunlaboro de s-ro Sibayama el Japanio. Projekto B celis sendi kompetentajn instruistojn al landoj, kie oni bezonas tiujn: tiu ĉi projekto estis ankoraŭ en preparo. Projekto C celis membrigi aziajn aktivulojn en UEA: en 2002 membriĝis 59 el Ĉinio, 1 el Irano, 3 el Pakistano kaj 14 el Vjetnamio.

La tria Azia Kongreso de Esperanto okazis en Seulo, Koreio, fine de aŭgusto, kun impona partopreno de 408 esperantistoj el 15 landoj, ne nur aziaj. Pluraj fakkunsidoj okazis, sed oni ne preterlasis la kulturaln flankon interalie per okazigo de kurso de



la Akademio Internacia de la Sciencoj. Estis decidite ke la kvara kongreso okazos en 2005 en Nepalo. En Nepalo jam okazis la kvara Himalaja Renkontiĝo fine de februaro. En Mongolio, interalie pro energia agado de vicprezidanto de UEA Lee Chong-Yeong, la landa movado intensigis sian laboron, kongresante en Ulaanbaatar kun sepdekda partoprenantoj. En Irano aperis la unua oficiala revuo en Esperanto, kio markas gravan atingon de tiu ne tro konata sed tre aktiva movado. Nova atingo en Irano estas instruado de Esperanto al afganaj rifuĝintoj en la urbo Maĵado. Dume, en Singapuro kunvenis esperantistoj por revigligi la tiean movadon.

Eŭropo

Malfacilas raporti pri eŭropa agado, ĉar ĝi estas tiel multflanka kaj ĉar la diversaj asocioj emas iri propran direkton. La Asocio ankoraŭ ne sukcesis starigi regionajn komisionojn kiuj kunordigu la agadojn de la diversaj landoj de Eŭropo, kvankam tio iagrade okazas pere de la Eŭropa Esperanto-Unio kaj ties kongresoj kaj aliaj aranĝoj (inkluzive de la Brusela Inform-centro, sub la lerta gvido de kimra ĵurnalistino Dafydd ap Fergus). Aktivis tamen la Balkana Komisiono de UEA, kiu zorgis pri vigligo de la movado en Turkio, kaj pri okazigo de klerigaj seminarioj por instruistoj. Ankoraŭ nesolvita estas la starigo de komisionoj por mezeŭropaj kaj orienteŭropaj landoj. Ni kaptas la okazon por atentigi iliajn membrojn en tiuj mondopartoj pri la ŝancoj, kiujn ili maltrafas.

Litovio, invitante la Universalan Kongreson en 2005, tre serioze pretigas sin, aparte flegante la kontaktojn kun la landaj aŭtoritatoj. Ĉitinda en tiu kunteksto estas la vizito de la prezidanto kaj vicprezidanto de UEA en aprilo kaj la instruado de Esperanto al centoj da interesitoj. Aparte menciinda agado estas eldono de litovlingvaj tradukoj de verkoj el Esperanto, aŭ de aliaj lingvoj per la internacia kiel ponto-lingvo. En Rumanio la movado estas tre aktiva en la kampoj eduka, kultura kaj literatureldona. En Italio okazis fine de la jaro, dank' al la IEF-prezidanto Aldo Grassini, grava aranĝo, dum kiu oni atribuis por la unua fojo Premiojn Zamenhof al meritplenaj pacagantoj, inter kiuj estas la itala sekcio de Kuracistoj sen Limoj. La honora komitato konsistas el kelkaj italiaj intelektuloj, inter kiuj prof. Tullio De Mauro kaj prof. Antonino Zichichi. La franca asocio daŭre aperigas sian novstilan kaj aparte belan revuon en la franca kaj en Esperanto, *Le monde de l'espéranto*; la brita instaligis en sia novkonstruita sidejo en Barlastono.

Dank' al obstina laboro de Salvatore Argentino, la kvina Eŭropa Kongreso okazis fine de aŭgusto en Verono, Italio. Altnivelan kulturaln programon pretigis Edvige Ackermann, en kiu ĉefrolis du prezidintoj de UEA, John Wells kaj Humphrey Tonkin. En la laborkunsidoj de la Eŭropa Esperanto-Unio, la ĝistiama prezidanto, Umberto Broccatelli, estis nomumita honora prezidanto, kaj la torĉon transprenis irlanda diplomato Seán Ó

Riain, kiu tuj prezentis tre konkretan planon por rekonigi la valoron de la internacia lingvo en la medioj de la Eŭropa Unio.

Oceanio

La laboro de la Oceania Komisiono estis relative malfacila pro la diseco de la diversaj landoj. Kiel jam tradicie, okazis Someraj Kursoj de Esperanto en Aŭstralio kun ĉeesto de 60 personoj el Aŭstralio, Novzelando, Vjetnamio, Germanio kaj Nederlando. Estis starigita hejmpaĝo de la komisiono. Dank' al Penny Vos, la entrepreno *Lote Teaching Aids* decidis eldoni instruhelpilojn en Esperanto. Komenciĝis la paca konkero de Indonezio per tradukoj en la tiean lingvon de varbmateriale kaj lingvokurso.

1.8 Informado, Instruado, Utiligado:

Esploro kaj Dokumentado

Respondeca estrarano pri esploro kaj dokumentado estis Humphrey Tonkin. La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), la esplora fako de UEA, rekte subtenas la Strategic Laborplanon de UEA sur ĉiuj ties tri laborkampoj: informado, instruado, kaj utiligado. Jam en 2001 ni notis signifan kreskon en la agado de CED; tiu kresko daŭris kaj intensiĝis en 2002.

En la jaro 2002 CED daŭrigis sian agadon sub direkto de forta kaj bone informita estraro, kiu konsistis el profesoro pri slavistiko Jouko Lindstedt (Universitato de Helsinki), docento pri interlingvistiko kaj la hungara lingvo Ilona Koutny (Universitato de Poznań), docento pri interlingvistiko Detlev Blanke (Universitato Humboldt, Berlin), vicprofesoro pri edukado Mark Fettes (Universitato Simon Fraser, Vankuvero), kaj la direktoro de CED, Humphrey Tonkin, universitata profesoro pri humanistiko (Universitato de Hartford, Usono). Sur la kampo informado, d-ro Blanke redaktis la regule aperintan *Informilo por Interlingvistoj*, kiu celas teni ĝisdataj la sciojn de interlingvistoj pri novaj eldonaĵoj, konferencoj, ktp. D-ro Tonkin kunlaboras kun d-ro Blanke en komplado de la ĉiujara *Internacia Bibliografio de la Asocio pri Modernaj Lingvoj* (Usono), kiu por la jaro 2001 (registrita en 2002) enhavis pli ol tricent bibliografiajn erojn pri Esperanto kaj interlingvistiko. Tiu ĉi estas nepre la plej kompleta bibliografio pri interlingvistiko kaj esperantologio.

Sur la kampo instruado, d-ro Fettes, en sia rolo kiel direktoro de Esperantic Studies Foundation (ESF), donis konsilojn kaj kunlaboron al pluraj projektoj subvenciataj de ESF, ekzemple *www.edukado.net*, nova retpaĝaro, kiu grave antaŭenigas unu el la celoj de UEA, la lernadon kaj instruadon de Esperanto. Edukado.net liveras informojn ĉefe por instruistoj, pri lerniloj kaj instruiloj kaj aliaj helpiloj rilate Esperanto-pedagogion. ESF ankaŭ subtenas *www.lernu.net*, kiu donas helpon al lernantoj de la lingvo. D-ro Tonkin estas prezidanto de ESF.

La kampon utiligado kovras precipe la revuo de CED, *Language Problems and Language Planning* (*Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado*) eldonata de la granda nederlanda eldonejo Benjamins (http://www.benjamins.com/cgi-bin/tl_seriesview.cgi?series=LPLP), kaj redaktata de d-ro Tonkin kaj d-ro Probal Daŝgupto, profesoro pri lingvistiko ĉe la Universitato de Hajderabado. La revuo aperas trifoje jare. Inter la artikoloj aperigitaj en 2002 estis detala recenzo de la etimologia vortaro de Vilborg (de Carlo Minnaja), studo pri lingva komunikado en internaciaj organizaĵoj (de Claude Piron), kaj prezento de la latina kiel internacia lingvo (de Vera Barandovská-Frank). La interlingvistikan fakon de la revuo redaktas d-ro Fettes. La artikoloj aperas en diversaj lingvoj, plej ofte la angla, sed kun resumoj de ĉiuj artikoloj en Esperanto. La revuo estas abonata de ĉiuj ĉefaj esplorbibliotekoj kaj membras en ĝia redaktokomitato eminentaj lingvistoj kiel ekzemple Ulrich Ammon, John Edwards, Joshua Fishman, David Graddol, Rainer Enrique Hamel, Shirley Brice Heath, Ali Mazrui, Robert Phillipson kaj Abram de Swaan. Pro tio, ke tiu ĉi unuaranga faka periodaĵo estas direktata unuavice al la ekstera publiko, ĝi estas relative nekonata en Esperanto-rondoj, sed ĝi ludas gravan rolon en la

akceptigo de Esperanto inter lingvistoj kaj aliaj universitatanoj.

Aperas ĉe UEA ankaŭ la plurlingva serio *Esperanto-Dokumentoj*, broŝurformaj informiloj pri diversaj aspektoj de UEA, Esperanto, kaj rilataj temoj. Aldoniĝis al tiu serio en 2002 i. a. traduko de verko de Robert Phillipson, *Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj*. En preparo ĉe UEA estas traduko de libro de Phillipson pri la eŭropa lingvopolitiko. Inter la ĉefaj prioritatoj de CED estas la kreado de granda reprezenta korpuso de Esperanto taŭga por utiligo fare de esploristoj; tiu projekto bone antaŭeniras sub la gvido de Bertil Wennergren, en kunlaboro de d-rino Koutny kaj kun subvencio de ESF. Alia ĉefa prioritato estas evoluigo de la faka terminologio en Esperanto: aktive kunlaboris dum la jaro retlisto *terminologio*, kun partopreno de d-ro Blanke kaj aliaj. La retlisto *bja-listo* daŭrigas sian agadon kiel kontaktilo de CED sub gvido de d-ro Lindstedt.

En la Universala Kongreso en Fortalezo, la Esperantologia Konferenco pritraktis la temon *La Esperanto-kulturo: Diverseco en unueco, unueco en diverseco*. Raporto aperis en la septembra numero de la revuo *Esperanto*, p. 178-179. Finiĝis la serĉado de subvencio por la Biblioteko Hodler, la biblioteko de UEA en Roterdamo: ESF subskribis kun UEA kontrakton por plena analizo de la financaj kaj aliaj bezonoj de la Biblioteko. La rezultojn ni espereble prezentos en nia venonta jarraporto.

Vigle progresas ankaŭ la agado de organizaĵoj kaj iniciatoj, kiuj diversmaniere apogas aŭ komplementas la laboron de CED: aperis en Svedio plia numero de la revuo *Esperantologio*; la germana interlingvistika organizaĵo Gesellschaft für Interlinguistik aperigis sian informilon kaj aliajn eldonaĵojn; ESF subvencias plurajn interlingvistikajn projektojn (vidu ĝian retpaĝaron *www.esperanto.org*) kaj gastigis (kaj daŭre gastigas) la retpaĝaron de CED (*www.esperanto.org/ced*); la nova docento pri interlingvistiko ĉe la Universitato de Amsterdamo, Wim Jansen, bone komencis sian agadon per organizado de publika kolokvo ĉe la universitato en decembro. Daŭris bonaj kaj intimaj rilatoj kun la Akademio de Esperanto: pluraj kunlaborantoj sur la tereno esploro kaj dokumentado estas samtempe Akademianoj. Kompreneble, la esplorado kaj dokumentado pri Esperanto kaj rilataj temoj estas preskaŭ senlima temo, sed la agado en kaj ĉirkaŭ UEA antaŭeniris tre efike en 2002.



La organiza bazo

2.1 La Decida Organo: La Komitato

Dum la jaro, je granda bedaŭro de ĉiuj aktivaj kunlaborantoj, mortis la slovaka A-komitatano Milan Zvara. Anstataŭ li la slovaka LA nomis novan komitataninon, s-inon Maria Tomašovičová. La Komitato kunsidis dum la Universala Kongreso en Fortalezo dufoje dum entute ok horoj. La kunsidojn partoprenis entute 38 komitatanoj persone kaj 11 komitatanoj

Spezokonto (en eŭroj)

KOSTOJ

Rezulto	Buĝeto	Rezulto
2001	2002	2002
262046	Salajroj	255000
41856	Socia assekuro	33000
5237	Suplementoj	5000
628	Kafo, teo, lakto	700
0	Malsankompenso	0
12371	Pensiaranĝo	14500
322138	Salajroj ktp, nete	308200
8703	Afranko, nete	11500
2162	Telekomunikiloj	3500
2926	Presajoj	3000
2442	Materialoj	3500
1094	Maŝinoj, riparo/prizorgo	3250
720	Revizoro	700
203	Administraj kostoj	300
2366	Kopiado	2500
-1187	Kopiado (vendoj)	-1000
19429	Centra Oficejo, nete	27250
5837	Gasoj, elektro	6000
355	Akvo	350
3572	Riparo de la Domo	750
3644	Purigado	3500
2851	Asekuro	3100
1613	Impostoj je la Domo	1450
-1064	Luo ricevita	-1050
16808	Oficeja Domo, nete	14100
27397	Preskostoj Esperanto	26000
11605	Grafiko	12000
32097	Dissendo/kovertoj	29500
-2022	Anoncoj	-3000
69077	Esperanto, nete	64500

A rajtigis siajn anstataŭantojn. Ĉeestis ankaŭ 3 observantoj. La komitatanoj estis informataj pri la okazaĵoj en la Asocio pere de komunikoj kaj komitataj ĉirkuleroj. La rilatoj kun la komitatanoj okazis ankaŭ pere de la reta diskutlisto de la Komitato. La fakto, ke ĉirkaŭ 86 % de la komitatanoj havas aliron al la reto, ebligas al ili dum la tuta jaro rekte starigi demandojn kaj ricevi respondojn, kvankam la komuna laboro (kontraste al la debatado) de la Komitato inter siaj ĉiujaraj kunsidoj ankoraŭ bezonas atenton kaj pliglatigon. La subkomitatoj formitaj dum la Universala Kongreso en Zagreb plue funkciis. Dumkongrese

8243	Preskostoj Jarlibro	8500	8626
9502	Dissendo/kovertoj	10000	9232
2175	Grafiko	2300	0
-4646	Anoncoj	-5500	-3493
15274	Jarlibro, nete	15300	14365
3220	Preskostoj Kontakto	3700	5059
5572	Dissendo/kovertoj	5500	5109
1757	Grafiko	2600	2483
2850	Redakto	2850	2700
-16	Anoncoj	-100	-82
13383	Kontakto, nete	14550	15269
11082	Estraro (vojaĝado)	8000	11793
1319	Estraro (korespondado)	1500	4311
1351	Oficistoj (vojaĝado)	2000	8976
759	Vojaĝado (UK)	2000	3618
14511	Vojaĝoj/korespondado	13500	28698
2371	Edukado	6000	1505
3631	Informado	5000	22731
3789	Eksteraj rilatoj	4000	1881
443	Komisitoj, vojaĝoj/korespondado	900	142
10234	Movada evoluigo	15900	26259
2033	Bankokostoj	2500	1749
-660	Kurzdiferencoj	0	-40
2130	Reprezentado	2000	2306
2198	Antaŭaj jaroj	0	3320
259	Diversaj kostoj	150	0
5960	Generalaj kostoj	4650	7335
0	Amortizo, domo	0	0
3991	Amortizo, aparatoj/mebloj	1600	1200
5714	Amortizo, komputiloj	5000	5626
1645	Amortizo, programaro	1250	2243
11350	Amortizo entute	7850	9069
498164	Sumo de la kostoj	485800	549007

Bilanco

de Universala Esperanto-Asocio je la 31-a de decembro 2002 (por komparo aperas ankaŭ la stato fine de 2001)

AKTIVOJ

	2001	2002
Domo, Roterdamo	138305	138305
Teren Aspremont	1	1
Nemoveblaĵoj	138306	138306
Ekipaĵoj & mebloj	5264	4727
Komputilaj aparatoj	13339	13124
Programaro	3173	6728
Maŝinaro ktp	21776	24579
Blokitaĵ monrimedoj	1914	4766
Akcioj	310790	238288
Obligacioj	2043856	2020181

Miksaj	641035	499364
Valorpaperoj entute	2995681	2757833
Stokoj libroservaj	127134	147168
Stokoj, Eldona Fakoj	151893	153791
Stokrezervo	-6370	-9380
Presajoj, materialoj k.s.	4860	5165
Provizoj entute	277517	296744
Ricevotaj rimedoj	89149	83253
Antaŭpagitaj kostoj	10239	-94
Debitoroj	84779	142487
Debitoroj ktp entute	184167	225646
Ŝparkontoj kaj deponoj	868863	542907
Kurantaj bankokontoj	181816	324378
Kasoj diversaj	4297	1416
Kasoj/bankokontoj entute	1054976	868701
Sumo de la aktivoj	4674337	4316575

Kelkaj klarigoj ĉe la spezkonto: * Salajrokostoj en 2002 superis la sumon buĝetitan, ĉar necesis ke novaj oficioj estu dungitaj antaŭ ol estis forintaj tiuj kiujn la novaj anstataŭas. * La revuo kostis en 2002 pli ol estis buĝetite, grandparte pro la aldono de pli da koloro. Kostoj en 2003 kaj 2004 estos pli malaltaj pro tio ke ni nun presas kaj dissendas la

ili sukcese funkciis kiel komitataj laborgrupoj. Ilia aktiveco dum la jaro plivigliĝis, tamen ne atingis ankoraŭ la deziratan nivelon. Nun ili estas entute ok.

En Fortaleza la Komitato nomis kvar novajn Honorajn Membrojn de la Asocio (detalojn vidu en la oktobra numero de la revuo Esperanto, p. 203): Evaldo Pauli (Brazilo), Kathleen Mary Hall (Britio), Kyotaro Deguĉi (Japanio) kaj Hans Bakker (Nederlando).

2.2 La Estonteco: Rilatoj kun TEJO

Inter la esperantista junularo elstaras la informada agado: TEJO organizis seminarion Esperanto@Interreto – Rete Lingvumi en Jugoslavio, seminarion Esperanto@Interreto – Rete Informadi en Svedio kaj seminario Esperanto@Interreto – Du bonegaj iloj de internacia komunikado en Turkio. Alia seminario estis organizita en marto 2002 en Litovio pri Aktiva civitaneco. Okazis ankaŭ seminario Homaj rajtoj sub ĉiutaga prespolo kunlabore kun la Junulara Centro de la Konsilio de Eŭropo, kiun partoprenis

RIMEDOJ

2782	Membroj Gvidlibro	2900	2728
20321	Membroj Jarlibro	22000	17982
116447	Membroj-Abonantoj	125000	101952
46261	Dumvivaj Membroj	48500	47930
4679	Membroj Jarlibro (junaj)	5100	3347
5408	Membroj-Abonantoj (junaj)	6700	2808
195898	Kotizoj de individuaĵ membroj	210200	176747
8326	Aligitaj membroj	9100	8002
1135	Aligitaj membroj junaj	1250	929
3695	Abonoj Esperanto	3650	3853
556	Kolektivaj abonoj Esperanto	1000	627
5762	Abonoj Kontakto	6000	4800
1674	Kolektivaj abonoj Kontakto	1300	1635
16701	Societo Zamenhof	19520	14858
2832	Fakaj Organizoj	2900	2950
-2278	pago al TEJO	-2570	-1582
234301	Kotizoj	252350	212819
139355	Vendoj de la Libroservo	130000	149026
-89497	Kosto de varoj venditaj	-86500	-99876
49858	Libroservo, malnete	43500	49150
-868	Merkatado	-1000	-1153
-1800	Katalogokostoj	-1800	-1800
-1271	al stokrezervo	-1100	-1472
2593	Abonfakoj	2600	1974

PASIVOJ

Generala Kapitalo	1087643	1004298
Saldo de spezkonto	-70	-57194
Kapitalo Azio	386039	372394
Kapitalo Afriko	12749	24546
Kapitalo Eŭropo	0	9238
Entute	1486361	1353282
Kapitalo Dumvivaj Membroj	639923	602407
Rezervo, debitoraro	5557	5475
Kongresa Rezervo	60173	77295
Rezervo IJK	5358	5358
Rezervo, emeritaj oficioj	102934	107881
Rezervo - 20%-a regulo	26711	1711
Rezervoj premiaj	28187	31255
Aliaj sumoj rezervitaj	70697	72847
Rezervoj entute	299617	306822
Apogo Thorsen	9181	8167
Belarta Fondajo	74961	75695
Fondajo Ameriko	21229	24050
Fondajo Biblioteko	11025	10862

revuon en Slovakio. * Estis bezono en 2003 de ekstra estrarkunsido. Ankaŭ la Oficeja Komisiono ne estis antaŭvidita nek la kostoj por kandidat-oficioj. * La Komitato decidis pri garantita subvencio por la Brusela Komunikad-Centro. Tio aldonis nebuĝetitajn kostojn ĉe Informado. * Falo de la membronombro rezultiĝis en 2002 falon en la kotizenspezo.

ankaŭ neesperantistoj (www.ikso.net/ric). TEJO kunlaboris kadre de la por-instruista pagaro www.edukado.net, komencis laboron pri Reta Informado-Centro kiu celas helpi al informantoj pri Esperanto, produktis profesia-kvalitajn afiŝojn, faldfoliojn, informiletojn kaj T-ĉemizojn kadre de E@I en Svedio, liveris plurlingvan informpagaron por TEJO www.tejo.org kaj publikigis unuan paĝon de plurlingva E-kursejo, lernu!, www.lernu.net.

TEJO kaj ĝia brazila sekcio sukcese okazigis la 58-an IJK 2002 en Pato Branco, Brazilo, kun ĉirkaŭ 100 partoprenantoj, kaj kun la kongresa temo Lingvo, kulturo kaj oportunejoj. Por nekvorumo la komitato tamen ne povis fari decidojn. TEJO starigis intensan kunlaboron kun la balkana komisiono de UEA kaj partoprenis en ekrenovigo de la projekto "Interkulturo". Nova Pasporta Servo aperis kun rekorde multaj gastigantoj en la tuta mondo. Aktivulo de TEJO kunlaboris en internaciaj junularaj konferencoj, dise en la mondo, informante pri Esperanto kaj serĉante kunlaboreblojn. La revuo Kontakto regule aperas kombinante sukcesajn tradiciajn elementojn kun novaj ideoj. TEJO-tutmonde daŭre prezentis ĉefajn movadajn agadojn de TEJO. Daŭre aperis la reta bulteno

48512	Libroservo, nete	42200	46699
20681	Vendoj de Eldona Fakoj	15000	23931
-27344	Aldonoj (novaj libroj)	-5000	-18031
13237	Saĝo stokvalora	-3500	1682
-1519	al stokrezervo	-1300	-1538
-700	Tantiemoj & stokado	-1250	-1593
4355	Eldona Fakoj, nete	3950	4451
22127	Grafikaj servoj CO	16500	8789
5075	Aliaj servoj CO	3200	1730
0	Programado	1000	4000
700	Instituto Hodler	700	700
500	Kompenso Propaganda Konto	10000	10000
69223	20%-a ĝustigo: laŭ kalkulo	8000	62646
-23100	20%-a ĝustigo: el rezervo	0	25000
74525	Servoj kaj Kompensoj	39400	112865
51511	Kotizoprocenĵaĵo UK	56000	31057
1000	Rezervo	0	10000
60	Turismo	7500	0
77815	Rento, nete	68500	71866
2273	Donacoj al la Ĝenerala Kaso	4500	1816
3742	Aliaj enspezoj	500	240
136401	Diversaj enspezoj entute	137000	114979
498094	Sumo de la rimedoj	474900	491813
70	Saldo	10900	57194
498164	Sumo de la kostoj	485800	549007

Fondajo Canuto	-669	539
Fondajo Grabowski	40456	36184
Fondajo Junularo	12642	23491
Konto Afriko	-6841	0
Konto Azio	10619	21099
Konto Edukado/Wüster	978	1153
Konto Espero	14259	18283
Konto Eŭropo	0	9152
Konto Reklamado EU	0	117939
Propaganda Konto	1594	29906
Triamonda Kongresa Fondajo	31779	27983
Volontula Fondajo	38292	34481
Fondajoj entute	259505	438984

Antaŭricevitaj rimedoj	154190	60133
Pagotaj kostoj	50925	16887
Pendantaj spezoj	15353	5829
Kreditoroj	1220313	1016781
Deponoj de membroj	548150	515450
Kreditoroj k.s. entute	1988931	1615080
Sumo de la pasivoj	4674337	4316575

de TEJO *TEJO-aktuale*, kiu aktuale, koncize, senpage raportas pri junularaj temoj.

Tamen, la financa situacio de TEJO estis malbona. UEA devis kovri buĝetan deficiton, kiu estas kaŭzita pro la deziro oferti almenaŭ minimuman servon al membroj kaj teni ilin informitaj. En la Centra Oficejo tre aktive laboris la volontuloj Christopher Culver kaj Anna Skudlarska por TEJO. Tamen la TEJO-estraro konkludis, ke plia profesigado de la agado estas bezonata. La komunikado inter TEJO kaj UEA intensiĝis, sed estas profundaj enhavaj malsamopinioj pri la direkto, kiun iru la asocio. La diskuto momente traktas plibonigon de la financado, profesian strukturadon de TEJO por kapabligi ĝin respondi al la defioj de la tria jarmilo inter la junularo, la servojn kiujn povas doni al ĝi la CO, kaj la gradon kaj formon de sendependeco de TEJO por ebligi al ĝi pli efikan kunlaboron kun internaciaj junularaj organizaĵoj kaj institucioj neesperantistaj. Pro financa malabundo kaj malforto de kerna TEJO-aktivularo apenaŭ eblas al TEJO agadi vere tutmonde. Ĝi devas limigi sin al monŝparaj, sed ja utilaj servoj ofertitaj pere de la interreto aŭ al seminarioj, por kiuj ĝi ricevas ekstermovadajn subvenciojn. Klasika agado, kiu kaŝas sin malantaŭ esprimoj kiel *landa agado* aŭ *scienca agado* apenaŭ okazas.

2.3 La Bazo kaj la Gvidado: Administrado

En aŭgusto 2001 la deĵorado de la nova estraro komenciĝis sub tre malfacilaj cirkonstancoj, per tri eksigoj de gvidantoj de la administra aparato de la Asocio. Ne nur temis pri problemoj persona, sed ankaŭ pri problemoj de la fizikaj laborokondiĉoj: jam delonge la Centra Oficejo en Roterdamo estas plenŝtopita de papero pro la kreskanta Biblioteko Hodler, la aktiva Libro servo, kaj la akumuliĝanta arkivo de la Asocio. Krome, la fizika kondiĉo de la konstruaĵo pli kaj pli bezonas atenton kaj riparadon. Eĉ oni demandas pri tio, ĉu eventuale la CO translokiĝu al pli oportuna, internacie aktiva urbo.

Kiel jam menciite en nia pasintjara raporto, la estraro nomis Oficejan Komisionon, kies taskoj estis, interalie, gvidi la rekonsistigon de la oficejaro kaj fronti la demandojn pri la estonteco de la oficejo. La komisiono konsistis el tri novaj estraranoj, vicprezidanto Humphrey Tonkin, ĝenerala sekretario Ivo Osibov kaj estrarano por financo kaj administrado Ans Bakker-ten Hagen. Ankaŭ Marko Naoki Lins, observanto por TEJO ĉe la estraro de UEA, partoprenis la laboron de la komisiono. La komisiono regule interkonspondis dum la jaro kaj kunvenis kelkfoje, tenante superrigardon pri la transiro al nova konsisto de la oficejoj, petante la oficeistojn konsideri novajn labormetodojn en tiu ĉi epoko de komputilaj, kaj komencante esplorojn (i.a. kun fakuloj pri la dommerkato kaj pri konstruado) kaj la domojn kaj alternativojn por la estonteco. La fakto ke la domo estas senhipoteka posedaĵo de la Asocio kompreneble estas avantaĝo.

La estraro selektis Trevor Steele (Aŭstralio) kiel agantan ĝeneralan direktoron ekde januaro 2002 (kaj poste forprenis la titolon *aganta*, plilongigante lian kontrakton). La demisiinta ĝenerala direktoro Osmo Buller helpis per transdono de sperto, kaj samon faris Pasquale Zapelli, direktoro de la CO, kiu ĝis aprilo restis en sia posteno. Li finis laborojn pri la komputila sistemo, ordigis aferojn rilate al la financa jarkonto, kaj postlasis por la nova aganta liston de taskoj. Siano Milojević, gvidanto de la Libro servo kaj antaŭa ĝenerala direktoro de la Asocio, kiu jam

pretiĝis sin por emeritiĝo, prokrastis sian pensiĝon je unu jaro kaj enkondukis en la laboron novan gvidanton de la Libro servo Ionel Onet, kiu ekde 2003 transprenis respondecon pri la servo. Fine de 2002 Milojević definitive forlasis la CO kiel oficejo de UEA, organizaĵo, kiun li servis dum pli ol 30 jaroj en pluraj funkcioj. Frue en 2002, István Ertl, la ĝistiam redaktoro de la revuo *Esperanto*, forlasis la oficejon post plurjara sukcesa redaktado, kaj la estraro nomumis novan redaktoron, Stano Marček, kiu, dank' al modernaj elektronikaj ekipaĵoj, faras la redaktan kaj kompostan laboron ekster la CO. Sekve la redakta laboro ne plu okazas en la oficejo kaj la grafika laboro en la CO malpliiĝis, kun rezultaj reduktadoj de laboro kaj kostoj. Pro tio en la jaro ni adiaŭis al Francisco L. Veuthy, kiu respondecis pri la jarlibro kaj grafiko. Marček jam metis sian stampon sur la revuon, kiu fariĝis pli bunta, kun alia grafika aspekto – kaj pli akurata.

Dungiĝis Joost Witteveen kiel respondeculo pri la komputila sistemo. Restis en siaj oficoj Roy McCoy (prespretigado), Clay Magalhaes (kongreso/administrado), Nikola Rašić (kongresoj), Marvin H. Stanley (financo), kaj Ate van Zeist (sekretario). Komence de la jaro estis 11 oficejoj. Fine de la jaro estis 9. Kunlaboris ankaŭ Rob Moerbeek (provegado) kaj Ina v.d. Krans (librotenado). Krome helpis Michiel Meeuwissen kaj Hakan Lundberg pri komputilaj aferoj. Tri personoj laboris en la oficejo kiel volontuloj, el kiuj 2 speciale por TEJO, la junulara sekcio de UEA.

La labora situacio en la CO post tiom da ŝanĝoj kaj perturboj estis por ĉiuj malfacila. La oficejoj devis (re)trovi sian laborritmon, kaj speciale la ĝenerala direktoro ne nur bezonis ĉiujn siajn talentojn por harmonie kunlaborigi homojn sed ankaŭ devis spertiĝi en la administraj bezonoj de la asocio. Tio kaŭzis mankojn en la servoj al la membroj, kvankam la absoluta akurateco de la revuo parte rekompensis tion. La estraro, siavice, devis multe okupiĝi ankaŭ pri la rutina administrado – kio siavice forprenis tempon, kiun ĝi normale dediĉus al pli perspektivaj strategiaj demandoj. La estraro sincere dankas al ĉiuj pro ilia komprenemo kaj kunlaboremo. Aliflanke la facileco de retroŝta komunikado kaŭzas daŭran kreskon de la nombro de komunikoj direktitaj al la oficejoj kaj la estraranoj, kies tempo pli kaj pli foruziĝas je simpla respondado.

La Afrika oficejo de UEA en Lomé pli kaj pli transprenis la laboron de la iama komisiito por Afriko Hans Bakker. En la oficejo deĵoris Koffi Doumégnon kaj Raoul Hounnake, sub gvido de la estrarano respondeca pri afrika agado Gbego Koffi. La oficejo prizorgis ankaŭ diversajn aliajn administrajn taskojn transdonitajn al ĝi de la CO. Dume, Brazilia Esperanto-Ligo disponigis oficejan ĉambron por la Amerika Komisiono, kvankam nur malrapide la oficejo eklaboris. En Novjorko la oficejon de UEA daŭre

prizorgis Rochelle Grossman kiel volontulo. Kial jam aludite, la revuo *Esperanto* en 2002 aperis 11 fojojn, ĉiam en la monato de la aperdato! *Kontakto*, la dumonata sociokultura periodaĵo de TEJO, aperis 6-foje, sub gvido de nova redaktoro, Jenja Zvereva, kiu prezentis allogan kaj tre vari-enhavan revuon.

Ĉe la jarlibro estis negativaj kaj pozitivaj. Ĝi bedaŭrinde malfruis, ĉefe pro la multaj ŝanĝoj en la oficejo dum la periodo de produktado. Sed granda nova problemoj de la epoko de retroŝto estis solvita: la konstanta ŝanĝo de retadresoj. Iam, UEA devis okupiĝi nur pri fizikaj translokiĝoj, kiuj okazis multe malpli ofte ol la virtualaj. Rezulte, la jarlibro estas malaktuala rilate al retadresoj jam kiam ĝi aperas. Tiun problemon oni bone solvis

Laste aperis

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insinjoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

1 Mai 1929. Der "Blutmai" in Berlin-Neukölln. Red. Roland Schnell. Berlin: R. Schnell, 2002. 36p. 21cm. Germanlingva. Pri la "sanga majoj" en Berlino, kun fragmentoj el la romano Metropliteno kaj historiaj dokumentoj kaj fotoj. € 1,80

ABC de la bestoj. Ein Esperanto-deutsches Rate-Bilderbuch. Guido Brandenburg, Manfred Retzlaff. Norderstedt: Books on Demand, 2002. 74p. ISBN 3 8311 4581 4. 27cm. Kolorigebla libro instruanta la E-alfabeton per E-lingvaj versaĵoj kaj germanlingvaj klarigoj. € 14,10

Beiträge zur Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR. Red. Detlev Blanke. Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des E-Verbandes im Kulturbund der DDR, 2003. 203p. 30cm. Kontribuoj al la historio de la E-Asocio en GDR. € 13,20

Elementa kalkullibro por infanoj. Wäner Marliëri Arruda. Ubá: La aŭtoro, 1988. 53p. 21cm. Baza instrulibro en facila Esperanto. € 4,50

Epitomo de esperantologio. Nikolao Gudskov. Moskvo: REU, 2002. 151p. ISBN 5 7161 0094 5. 20cm. Ĝenerala superrigardo pri la diversaj aspektoj de Esperanto (interlingvistiko, historio, kulturo, movado, instruado). € 7,50




Esperanto-Jugendgruppen in der DDR. Torsten Bendias. Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des E-Verbandes im Kulturbund der DDR, 2003. 61p. 30cm. Germanlingva. Rigardo super la Esperantaj junulgrupoj en la iama GDR. € 6,00

Esperanto – lærebok / lerno-libro. Jon Rømmesmo. Røys: La aŭtoro, 1991 (3-a eld.). 105p. ISBN 82 992359 5 2. 24cm. Ilustrita lernolibro por norveglingvanoj. € 12,90

Esperanta-rusa vortaro. E. A. Bokarev. Moskvo: 2002. 308p. 21cm. Nova, reviziita kaj kompletigita eldono (ĉ. 29000 kapvortoj), kun aldono de mallonga gramatiko de Esperanto. € 7,50

Gvidlibro pri Jokohamo – havenurbo nova kaj malnova. J. Aida, K. Suzuki, M. Sidara. K. Aida, K. Sidara, fotoj. Jokohamo: 21cm. Ilus. Mallongaj rakontoj kaj scenetoj. € 1,20

... ke ĉiuj estu unu... Stato de ekumeno sojle de la 3-a jarmilo. Heinz Schütte. El la germana trad. A. Burkhardt. Villingen: IKUE/KELI, 1999 (2-a eld.). 50p. 21cm. Malgranda ekumena katekismo. € 2,70



Mevo, 1995. 38p. 21cm. Ilustrita gvidlibro pri la kandidat-urbo de la 92-a UK. € 4,50

Hong Heng-Wi, la esperantisto. Seoul: Korea E-Ligo, 2000. 244p. ISBN 89 87281 03 5. 23cm. Bind. Ilus. Plejparte korelingva. Memolibro omaĝe al pioniro kaj aktivulo en la korea E-movado. € 16,50

Humuraĵoj. W. H. Simcock. Wrexham: EKO Publications, 2000 (2-a eld.). 28p. ISBN 1 903422 00 0.

Mondo afabla ne nur al vortoj. Jiří Karen. El la ĉeĥa trad. Jaroslav Mráz. Ústí nad Orlicí: Ofiis, 2002. 85p. ISBN 80 86042 61 8. 20cm. Pli ol 50 modernstilaj poemoj. € 6,60

Pardonu min Muzo. Mekys Antanas. Vilnius: La aŭtoro, 2000. 56p. 15cm. Debutvolumo de la litova E-poeto. € 3,00

Suno kaj ombroj. Rejna de Jong. Antverpeno: FEL, 2002. 75p. ISBN 90 77066 02 0. 21cm. Originala



poemaro pri feliĉo, pri rememoroj, pri la naturo; poemoj pri malpaco, pri poluado, pri komerco kaj konsumado, pri atomenergio kaj pri Eŭropo. € 9,90

Tubulos kalbos paieškos europos kulturoje. Umberto Eco. En la litovian trad. Inga Tuliševskaitė. Vilnius: Baltos lankos, 2001. 343p. ISBN 9986 813 77 8. 21cm. Bind. Litovlingva versio de la libro *La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo*. € 24,00

Verda E. Kim. Seoul: Korea E-Asocio, 2002. 107p. ISBN 89 87281 08 6. 23cm. Plejparte korelingva. Memolibro pri korea E-pioniro kaj aktivulo. € 9,90

Verkaro de J. F. Farjon de Lagatinerie. Kompilis Harada Tsukuru. Kumamoto: La kompilito, 1998. 37p. 21cm. Kun fotoj. Kvar rakontoj-anekdotoj, kun aldonaĵoj teksto de la kompilito. € 7,50

Vivo de Hajpin Li. Red. Lee Nakkee. Seoul: Korea E-Ligo, 2001. 248p. ISBN 89 87281 05 1. 23cm. Bind. Ilus. Plejparte korelingva. Memolibro pri korea E-pioniro kaj aktivulo. € 16,50

Vivo de Henriko Kvina, La. William Shakespeare. El la angla trad. Humphrey Tonkin. Roterdamo: UEA, 2003. 158p. ISBN 92 9017 083 2. 21cm. La historio de la vivo de Henriko Kvina post lia kronado kaj lia strebo al la franca trono. € 12,00. Triona rabato ekde tri ekz.

Vortoj de la nokto. Slova noci. Zdenka Bergrová. El la ĉeĥa trad. Jaroslav Mráz. Praha: La aŭtoro, 2002. 80p. ISBN 80 238 7957 X. 20cm. Ilus. Bele eldonita kolekto de poemoj. € 6,60

Weltsprachenwörterbuch Deutsch-Esperanto Esperanto-Deutsch. Dietrich M. Weidmann. Zürich: Mondo-Servo, 2003. 166p. ISBN 3 909 140 157. 21cm. Nova, dudirekta vortaro por germanlingvanoj, kun po 23 000 kapvortoj en ĉiu direkto, plus mallongaj historioj de planlingvoj, interlingvistiko kaj Esperanto, kaj prezento de la Esperanta gramatiko. € 27,00

(kvankam ne sen peno): la Asocio enkondukis plusend-adreson por la Delegitoj kaj por la membroj kiuj deziras tion. Per adreso uea-kodo@uea.org mesaĝo estas aŭtomate plusendata al la aktuala retadreso de la adresito. Tiel la jarlibro restas daŭre aktuala rilate retadresojn.

Ankaŭ en la pasinta jaro la Centra Oficejo bonvenigis gastojn dufoje dum Malferma Tago. Unu okazis en aprilo, alia en novembro. Ambaŭ allogis multajn vizitantojn, kiuj kaptis la okazon profiti la reduktitajn prezojn en la Libroservo.

Kiel funkcias UEA?

Universala Esperanto-Asocio havas sian Centran Oficejon (la tielnomatan CO) en Roterdamo, Nederlando. La profesia stabo de la Asocio laboras en domo en unu el la grandaj stratoj de la urbo. Tie troviĝas i.a. la Biblioteko Hector Hodler, la Libroservo kaj la kongresa administrejo.

La konstruaĵo estas posedaĵo de UEA, kiu ĝin aĉetis en 1961. La brika domo estis konstruita en 1887. Gvidanto de la adminstracio de UEA estas la Ĝenerala Direktoro. La Komitato estas la ĉefa gvida organo de la Asocio: ĝi konsistas el reprezentantoj de la landaj kaj fakaj asocioj aliĝintaj al UEA (Komitatanoj A), reprezentantoj de la membraro (Komitatanoj B), kaj alelektitaj komitatanoj (Komitatanoj C). Ĝi kunvenas ĉiujare en la Universala Kongreso de Esperanto. Ĉiun trian jaron ĝi elektas Estraron, kutime 7- aŭ 8-membran, por teni superrigardon de la Asocio kaj fari necesajn decidojn inter la komitatkunsidoj. La Estraron helpas diversaj komisionoj kaj komisiitoj pri specifaj taskoj. La Ĉiujara Universala Kongreso de Esperanto estas organizata de UEA en kunlaboro kun Loka Kongresa Komitato, ĉiam en alia lando. Okazis ĝis nun 87 kongresoj: tiu por 2003 okazos en Gotenburgo, Svedio. Por siaj membroj UEA eldonas ĉiujmonate la revuon *Esperanto* kaj ĉiujare jarlibron kaj funkcigas ampleksan repaĝaron.

La Estraro

Renato Corsetti, prezidanto. Iama prezidanto de TEJO. Profesoro pri Psikopedagogio de Lingvo kaj de Komunikado en la fakultato Psikologio 1 de la Universitato La Sapienza, Romo.

Humphrey Tonkin, vicprezidanto (esploro kaj dokumentado, strategio kaj planado). Iama prezidanto de TEJO; prezidanto de UEA 1974-80 kaj 1986-89. Universitata profesoro pri humanistiko ĉe la Universitato de Hartford, Usono; iama prezidanto de la universitato.

Lee Chong-Yeong, vicprezidanto (eksteraj rilatoj). Iama prezidanto de Korea Esperanto-Asocio; prezidanto de UEA 1995-98. Iama profesoro pri ekonomiko de Ŝtata Universitato Kyongpook, Koreio, kaj nuna prezidanto de Korea Instituto por Industria kaj Ekonomia Disvolviĝo.

Ivo Osibov, ĝenerala sekretario (faka agado, kongresoj, rilatoj kun TEJO). Iama prezidanto de TEJO. Iama estro de jura sekcio de granda industria entrepreno. Supera lekcisto pri komerca juro kaj kompania juro en la Jura Fakultato de Split, Kroatio.

Ans Bakker-ten Hagen (financo, administrado). Unua prezidanto de la landa asocio Esperanto-Nederland. Iama estrarano de diversaj organizaĵoj pri emancipado (sindikato, edukado); emeritiĝinta skabeno.

Gbeglo Kofi (edukado, kulturo, afrika agado). Aktivulo de la Togolanda Esperanto-movado, redaktoro de ĝia bulteno. Verkisto de rakontoj kaj de lerniloj en Esperanto. Instruisto pri matematiko.

Andrej Grigorjevskij (informado). Dufoja prezidanto de Rusia Esperanto-Unio. Esperanto-instruisto kaj organizinto de ĉ. 40 Esperanto-renkontiĝoj. Profesia retej-faristo.

Michela Lipari (landa kaj regiona agado). Iama komitatano de TEJO, estrarano de UEA de 1992, vicprezidanto de Itala Esperanto-Federacio. Funkciulo de la itala ŝtata kontrolkortumo.

Kion alportis la aprila estrarkunsido?

Dum la dua aprila semajnfino kunsidis en la Centra Oficejo en Roterdamo ĉiuj ok membroj de la UEA-Estraro por okupiĝi kaj decidi pri aktualaj demandoj kaj problemoj. Jen skize pri la plej gravaj novaĵoj.

La plej unua el ili verŝajne rajtus esti tiu, ke okazis renkontiĝo de la oficistoj kaj estraranoj dum kiu estis klarigitaj pluraj reciprokaj miskomprenoj. La oficistoj ricevis klarigojn pri la estrara politiko rilate al la Oficejo kaj garantiojn, ke neniukondiĉe la estraro planas okazigi iujn drastajn ŝanĝojn sen konsideri la oficistojn kaj ilian socian sekurecon.



Tre valore kaj pozitive al la sukceso de la kunveno kontribuis Nikola Rašić, nia ĵus demisiinta Konstanta Kongresa Sekretario. Li, ve, ne ŝanĝis sian decidon forlasi la CO-n de UEA (kie li ofidis dum dek kvin jaroj), tamen klopodos maksimume helpi al la LKK de la Gotenburga UK kaj al la CO por ke la kongreso estu sukcesa.

Alia atentinda novaĵo estas ke estis decidite malfondi la Oficejan Komisionon, kiu plenumis sian rolon. Ĝiaj funkcioj estas redonataj al la regulaj organoj de la Asocio – la Estraro, la Komitato kaj la Financa Komisiono.

Grandan parton de la kunsida tempo okupis financaj demandoj, i.a. projekto pri la buĝeto 2004 kaj multnombraj urgaj demandoj de tiu ĉi jaro. Multe da tempo kaj atento estis donitaj al la Proponaro de TEJO. Pluraj ĝiaj teoriaj partoj estis senprobleme akceptitaj, kiel koindcaj kun la streboj de UEA

(temas pri la oficeja modernigo). Sed bedaŭrinde, ankaŭ ĉi-foje la estraro ne diris klaran "jes" aŭ "ne" pri la propono enkonduki plentempan TEJO-oficiston, por kio TEJO petis 105 mil eŭrojn dum 4 jaroj.

La decido tekstis, ke la Estraro ne povas preni starpunkton pri tiu demando antaŭ ol aperos instrukcioj de la Komitato pri la investa politiko de UEA: ĉu ni permesas al ni uzi partojn de la kapitalo kaj kiomajn aŭ elspezu nur renton de ĝi?

La peto al la Komitato decidi pri nia politiko tiukampa venos post kelkaj semajnoj per la ordinara poŝto – kun aldonado de rekomendoj de la Financa Komisiono de UEA, kunsidinta en majo.

La lasta afero, kiun mi ŝatus mencii, estis parta redistribuo de la funkcioj en la Estraro. Pro troaj ŝarĝoj en la ekstermovadaj agadoj petis modifi siajn estrarajn taskarojn Humphrey Tonkin kaj Ivo Osibov.

Estis decidite, ke Humphrey Tonkin transdonas la respondecon pri la strategio al Renato Corsetti kaj anstataŭe prenas de Gbeglo Kofi la laborkampon pri kulturo. Ivo Osibov transdonis la respondecon pri TEJO al mi.

Andrej Grigorjevskij



ESEOJ MEMORE AL IVO LAPENNA
Fascina mozaiko de personaj rememoroj pri la arkitekto kaj konstruinto de la moderna UEA. Kopenhago, 2001. 417p. 25cm. Kun kompaktdisko. Prezo: €45,00. Triona rabato ekde 3 ekz.




RETORIKO MALPLIKOSTA
Retoriko. Science redaktita, pense riĉiga verko de Ivo Lapenna. Roterdamo, 1971 (tria eldono). 294p. 20cm. Prezo: €19,80 (malnova prezo: €23,15). Triona rabato ekde 3 ekz.



Premiita romano, kvazaŭ taglibro de homo, kiu erarvagas sub influo de politika ideologio. Aparte taŭga en la nunaj tagoj de politika menslavado.

KIUJ SEMAS PLORANTE... Ēva Tófalvi kaj Oldrich Knichal. Rotterdam: UEA, 1984. 106p. 21cm. ISBN 92 9017 029 8. €4,80. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



Siatempe epokfara traduko (el la kroata kaj germana) de historia romano pri la romia imperiestro.

CEZARO. Marko Jelusić, trad. Ivo Rotkvić. Zagreb: Fontoj, 1997 (dua eldono). 486p. 21cm. Bind. Prezo: €27,00. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.